

# S

## Lilly SCHAERER

1905-2001



Post la komerca lernejo kaj la diplomiĝo en 1925 en Langenthal/BE (kie ŝi loĝis de 1913) S. laboris kiel komerca oficistino, korespondantino kaj librotenistino en Bazelo kaj Zuriko antaŭ ol reveni al Langenthal en 1940 por esti dungita kiel sekretariino kaj librotenistino en teksaj-kolorejo de sia urbo. Apud profesie ŝi aktivis en la kanto-societoj de Zuriko kaj Langenthal.



Lilly Schaerer (meze) kaj Otto Walder (dekstre)

S. lernis Eon en 1932 en kurso de la rumana e-isto Tiberio Morariu (1901-87) en Zuriko. Sub la aŭspicio de →Edmond Privat, ŝi trapasis la superan diplomon de SES por instrui Eon (1943). Sekve ŝi aliĝis al la Eo-movado, partoprenante la aranĝojn de EJS kaj EEK. Seninterrompe dum tridek jaroj S. apartenis al la CK de SES, jen kiel prezidantino (1957-60), jen kiel sekretariino, kaskontrolantino kaj kasistino (1960-88), jen kiel organizantino de kunvenoj. Lige kun tiuj funkcioj SES havis sian asocian adreson verŝajne dum pli ol tri jardekoj ĉe la privata adreso de S. (Schorenstrasse 32, Langenthal). De 1947 S. estis ankaŭ fakdelegitino de UEA (pri teksado). Por la LKK de la 64a UK (Lucerno 1979) ŝi deĵoris kiel kasistino. S. estis honora membrino de SES.

→Svisa Esperanto-Societo



Lilly Schaerer (mezo) en 1940



## SCHAFFHAUSEN

Kantono en nordorienta, germanlingva Svislando (germanlingve: Schaffhausen, mallong. SH: 299 km<sup>2</sup>, 73'900 loĝantoj/2004). Ĉefurbo: Schaffhausen. (Oficiala Eo-versio de la toponimo Schaffhausen laŭ PIV ne ekzistas).

Krom du mencioj pri Eo el la jaro 1906 en tiu kantono ne ekzistas informoj pri Eo-aktivecoj. En 1989 estis raportite pri la ekzisto de Eo-Centro S., sed tiu iniciato restis efemera.

## Joseph R. SCHERER

1901-1967




Laŭdevene S. estis svizo (lucernano), profesie bankoficisto (ĝis 1930), kiu en la 1920aj jaroj elmigris al Kalifornio (Usono), kie li iĝis usona ŝtatano kaj laboris por la asekurejo New York Life Insurance Co. Li estis ankaŭ altranga administranto en la skolta movado de Usono kaj faris multe por enkonduki Eon en skoltaj medioj.



En 1930

Laŭ propraj indikoj (kronika libro de la berna ES) S. estis esperantigita de →Eduard Spielmann kaj trapasis ankaŭ la superan ekzamenon de SES. S. ĉeestis la UK en Nurembergo (1923), Vieno (1924) kaj Krakovo (1931) kaj multajn naciajn Eo-kongresojn. Post sia alveno en Usono S. instruis Eon en la politeknika vespera lernejo de Los Anĝeleso. Tie li fondis la lokan EK (1928), kiun li prezidadis, krome li estis ankaŭ multjara delegito de


UEA kaj IEL, membro de la Lingva Komitato, prezidanto de EANA (1935-42) kaj membro de la ekzamena komitato de EANA, krome honora membro de la lucerna ES. Sed li fariĝis konata precipe pro siaj vastaj vojaĝoj ĉirkaŭ la mondo. Post kiam li donis sian preferon al ĵurnalismo kaj profesia prelegado, la globtrotulo faris en 1930-32, kiel speciala delegito de la →Internacia Centra Komitato de la Eo-Movado (ICK), mondvojaĝon dum 525 tagoj tra 43 landoj, i.a. Svislando, Li realigis, en ses lingvoj, 322 prelegojn per lumbildoj kaj parte perradie, en universitataj lernejoj kaj geografiaj societoj, konstante atentigante pri la praktika valoro de Eo dum vojaĝoj kaj por ĵurnalismaj celoj, disdonante 9'000 *Eo-ŝlosilojn*. En 1936-37 li faris duan vojaĝon tra 12 eŭropaj landoj – tiam entute 330'000 personoj aŭdis liajn paroladojn; li mem faris 41'000 fotografadojn en 48 landoj. Kiel rezulto de tiu vojaĝado aperis libroforme liaj aŭtobiografiaj raportoj *Ĉirkaŭ la mondon kun la Verda Stelo* (1933) kaj *Tra Usono kun Ruliĝanta Hejmo* (1937). Ankaŭ *HdEo* kaj aliaj Eo-gazetoj aperigis liajn artikolojn. En Usono S. instruis Eon al filmsteloj kaj geaktoroj de Holivudo, intervjuis diversajn filmreĝisorojn, laboris kiel 'teknika konsilanto' pri Eo en diversaj filmoj. Ankaŭ lia edzino *Helen* (+1985) estis e-istino kaj ilia filino *Helena-Heidi* (\*1945) estas denaska e-istino. →Universala Esperanto-Asocio →ICK



Du aliaj fotoj de Joseph R. Scherer

## Jakob SCHMID


1869-1955



S. laboris kiel ŝtata oficisto (estro) en administrejo (ministerio) pri publika ekonomio. Kiel rimarkinda Eo-pioniro li publike prelegis en diversaj urboj de Svislando kiel en Liestal/BL kaj Sissach/BL, Rheinfelden/AG (1909), en Bazelo (1911), en Gelterkinden/BL (1912) ktp. kaj tiel atentigis vastan publikon pri Eo. Pluraj svisoj lernis Eon kaj fariĝis aktivaj e-istoj pere de S. (ekz. →Eduard Spielmann, →Eduard Stettler, →Fritz Schwarz). S. servis kiel sekretario kaj prezidanto de la berna EG, kies honora membro li fariĝis. Kiel prezidanto de LKK li sukcese realigis la du UK en 1913 kaj 1939 en la svisa ĉefurbo kaj trafe defendis sin kontraŭ idistaj atakoj. En 1914 S., kiu tiam estis prezidanto de SES, planis organizi en Berno kongreson de la 'homaranoj', kiu tamen ne okazis, kaj en 1915 li esploris la sintenon de la komercistaj asocioj kaj iliaj klerigaj lernejoj rilate la internacian komerclingvon. S. aŭtoris turisman prospekton pri Berno (1936), verkis Eo-lernolibron por germanlingvanoj kaj kunlaboris kun la redaktoroj de la →*Svisa Antologio* (1939). S. estis komitatano de UEA, membris en la Lingva Komitato kaj en la ekzamena komitato de SES. S. tradukis diversajn verkaĵojn (*La organizado de la intelekta laboro* de Bühler kaj Saager, 1911; *La Patrino* de Ernst Zahn, 1913, 2a eld. 1923) kaj ricevis premiojn dum la Internaciaj Floraj Ludoj. Ankaŭ *Ĉe la sanktaj akvoj* de J.C. Heer (1947) estis fintradukita en kunlaboro kun S. (kaj Paul Le Brun). Post la dua mondmilito S. retiris sin de la Eo-movado kaj estis forgesata.



Karikaturo pri la berna 'ursego' Jakob Schmid, kiu strangolas idiston



maldekstre: Jakob Schmid en Soloturno (1909)  
dekstre: Henri Dor kaj Jakob Schmid

→Svisa Esperanto-Societo →Bern  
→Universalaj Kongresoj de Esperanto  
→Grizono →Soloturno

## Hermann SCHMUTZ


1896-1993

## Jeanne SCHMUTZ-SAENGER

1895-1982



En sia junaĝo Hermann S. laboris en bienoj en Seeland (berna kantono), en Tray apud Payerne/VD (1912) kaj ĝis 1919 en la regiono de la ĝeneva lago. Fine de la unua mondmilito lin allogis la ideoj de V.I. Lenin kaj de la komuna posedaĵo, tamen la realeco sub Stalin kaj Hitler senluziigis lin. En 1919 li eklaboris kiel trajnmanovra dungito. En la 20aj jaroj li fondis vendejon por manĝiloj, kuiriloj kaj tranĉakrigiloj kaj translokiĝis al Allschwil/BL. Unu el liaj ŝatokupoj estis la naturkuracado, kaj li mem produktis oleon kaj unĝventon. Ĝis en sia alta aĝo li posedis bonegan vidkapablon propradire dank' al la ĉina masaĝarto, kiun li eklernis tra la revuo *El Popola Ĉinio*.



Dekstre staras Hermann Schmutz



E-ista pikniko sur Passwang en 1935 (dekstre sidas Hermann Schmutz)



Hermann Schmutz kun belgoj kaj germanoj

La familio de Jeanne S. devenis el germana Vestfalia, kie ŝia patrino rilatis kun la grupo ĉirkaŭ la fama socialdemokrato Auguste Bebel (1840-1913). Sekve al la kontraŭ-socialdemokrata leĝo de imperiestro Vilhelmo de la 21a de oktobro 1878, la patro devis forlasi Vestfalion kaj ekloĝis en Montreux/VD, kie li malfermis horloĝan kaj juvelan vendejon. De 1925 Jeanne S. loĝis kun sia edzo en Allschwil/BL.


Ambaŭ S. lernis Eon verŝajne ankoraŭ antaŭ la geedziĝo (ĉ. 1920). Per tiu lingvo ili vaste utiligis la internaciajn kontaktojn, multe vojaĝis kaj ofte partoprenis la aranĝojn de IFEF, UEA kaj SAT, kies multjara delegito Hermann S. estis. En 1932 li aliĝis al SAEF kaj samjare partoprenis fervojistajn aranĝojn. Fine de la 30aj jaroj Jeanne S. redaktis la laboristan bultenon *La Semanto*. En 1969 Hermann S. estis nomita SAEF-komisiito. En 1993 la bazela ES elektis lin honora membro, Jeanne S. estis kasistino de la bazela ES dum multaj jaroj. Ankaŭ ilia sola filo Marcel Iernis Eon (1939).



Hermann Schmutz kun laboristaj e-istoj en Ĝenevo en 1931 (fotoj el la arkivo de Eo-Societo Basel)

### **Fritz SCHWARZ**

1882-1969



Post la duagrada lernejo, progimnazio en Thun/BE kaj fakaj studoj pri mekaniko, elektro, tekniko, S. fariĝis mekanikisto ĉe la bernaj elektrocentraloj kaj laboris kiel maŝindeseĝnisto kaj sekciestro (varaĉeto) ĉe la Konfederacia konstrumetiejo en Thun. Apudprofesie li instruis teknikan desegnadon ĉe la metilernejo en Thun. Krome li aktivis kiel fajrobrigadisto (serĝento), kiel ĥora kantisto kaj kiel ano de la svisa loĝio Odd Fellow (de 1920). Li engaĝiĝis ankaŭ kiel arkivisto de pluraj asocioj kaj kiel kronikisto pri la urbo Thun.

S. lernis Eon en 1908 en kurso de →Jakob Schmid. Sekve li aktiviĝis kiel kasisto de EG Thun, kiel ĝia responsulo pri lingvo-ekzercoj kaj kiel Eo-instruisto, krome li raportis por la gazetaro dum la 9a UK (Berno 1913). 1914-

43 li devis interrompi sian Eo-agadon pro profesiaj kaj familiaj kialoj. Repreninte sian Eo-laboron, en 1949 li trapasis la superan ekzamenon de SES kaj ĉeestis plurajn UK. De 1951 li estis UEA-delegito kaj kunlaboris kun →Arnold Bohren, eldonante turisman Eo-prospekton pri Thun (1952). La vastaj Eo-kontaktoj helpis al S., ke ĉe li amasiĝis granda kolekto de vojaĝraportoj kaj fotoj. Kompreninte la valoron de skribaj kaj bildaj dokumentoj, en 1952 li akceptis la taskon de arkivisto kaj bibliotekisto de SES, redaktis ĉi-koncernan katalogon kaj kunlaboris kun CDELI post ties starigo. En 1955 SES elektis lin honora membro. S. mem desegnis sian propran tombo-ŝtonon, kiu prezentas la terglobon kun tri Eo-steloj, aludante al liaj tri ĉefaj ŝatokupoj).

→Berno →Bibliotekoj



Tomboŝtono de Fritz Schwarz



### **SCHWYZ**

Kantono en germanlingva, centra Svislando (germanlingve: Schwyz, mallong. SZ: 909 km<sup>2</sup>, 137'500 loĝantoj/2005). Ĉefurbo: Schwyz.

La kantono Schwyz apartenas kune kun aliaj katolikaj kantonoj de centra kaj okcidenta Svislando al tiuj regionoj, kie la Eo-movado preskaŭ komplete mankas.

La 14a nomaro de SES, publikigita en *SE* 3/1905, menciis iun s-ron A. Fuchs en *Einsiedeln*. Ĉi tie ekestis en 1937/38 la EK Movado. En *SE* 1/38 prezidanto Bisegger, kiu loĝis en pensio zur Blume, informis, ke la ĉefa problemo de lia laboro estas la cirkonstanco, ke la studentoj (evidente de la monaĥeja lernejo) konstante forveturas kaj alvenas. Tial li rezignis pri la aligo de sia klubo al SES. Poste oni ne plu trovas informon pri la Eo-agado en tiu urbeto.

Laŭ la raporto de la ĝenerala sekretario de Ligo de Nacioj de 1922 Eo estis instruata en kolegio de Schwyz.

*SE* 3/1935 sciigis pri la starigo de EG en *Gersau*, turisma vilaĝo apud la Kvarkantona Lago. Antaŭmilite ekzistis UEA-delegitoj en Gersau, Seewen kaj Siebenn.

### **Giorgio SILFER (Valerio ARI)**

\*1949. Loĝas en La Chaux-de-Fonds NE



Naskita kiel *Valerio Ari*, ĝis 1975 S. vivis en Italio, ĝis 1978 en Finnlando, poste li ekloĝis en Svislando. 1967-82 li laboris kiel diplomita lingvo-instruisto en plej diversaj niveloj: de la unuagrada lernejo ĝis la universitato kiel gastdocento, publike kaj private; 1966-72 li agadis en la junulara federacio de Itala Respublikana Partio. En 1982 li retiriĝis de la profesia instruado kaj fariĝis organiza konsilisto en Milano. En 1981 li doktoriĝis (Ĝenovo, Italio) pri modernaj lingvoj (titolo de la unua disertacio: *La kastilia kiel bazo kaj rimedo de la interlingvistika planado*), kaj en 1986 (Milano) pri beletristiko (titolo de la dua disertacio: *La itala kontribuo al la originala literaturo en Eo*). La filologo, verkisto kaj ĵurnalista estas membro de la svis-itala PEN-Centro. En 1972 S. deklaris sin bahaa-

no, sed de 1984 ne plu partoprenis en la bahaa komunumo. En 1996 S. fariĝis, kune kun sia edzino →Perla Ari-Martinelli, svisa ŝtatanano.

S. lernis Eon en 1965 unue memstude, poste en vespera kurso ĉe la milana EK (li posedas ĉiujn diplomojn de Itala Instituto de Eo kaj de Franca Eo-Instituto, krom la kvina grado). Kiel multflanka aktivulo kaj influa intelektulo de la Eo-movado li ofte organizas, gvidas kaj partoprenas kulturajn kaj literaturajn Eo-aranĝojn, en Svislando kaj eksterlande, verkas originale en Eo kaj ofte kontribuas per prelegoj kaj per gazetartikoloj pri esperantologiaj kaj movad-historiaj kaj -strategiaj temaroj. En 1969 li kunfondis la literaturan rondon La Patrolo (ekzistintan ĝis 1979) kaj en 1980 ĝian daŭriganton, la svisan Kooperativon de →Literatura Foiro (LF-koop). Ĝis 1980 li rolis kiel ĉefredaktoro de la revuo →*Literatura Foiro* por poste transdoni la redaktan torĉon al Perla Martinelli (1979). En 1991 S. partoprenis la starigon de la Esperanta PEN-Centro kaj en 1993 esence kontribuis al ĝia ratifo kaj al la agnosko de Eo kiel literatura lingvo fare de la fina asembleo de la 60a mondkongreso de PEN-Klubo en Santiago de Compostela (Hispanio). En 1982, 1983 kaj 1984 S. estis premiito de la Internaciaj Floraj Ludoj. 1969-72 kaj 1975-80 li estis komitatano de TEJO, 1975-77 redaktoro de *Kontakto*.

Ĉe KCE S. rolis kiel ano de la kultura komisiono kaj kiel kursestro de IFA. En 1995 li estis elektita kiel prezidanto de la direkta komitato de La Dompato/KCE, 1990-94 li estis ankaŭ membro de la fonduma konsilio de GEP. Sed li apartenis/as ankaŭ al la lozana ES, SES, Societo Yvonne Martinot, Itala Interlingvistika Centro. Ekde 1998 S. agadas kiel protagonisto de la →Esperanta Civito, ekde 2005 ankaŭ favore al la disvastigo de esperantologio en Afriko.

En *LF* 72/1982 S. omaĝis al sia patro Serafino Ari (1909-72), apoginto de Eo. La patrino de S. kutimis feriadi ĉe GEP.

→Literatura Foiro →Esperanta Civito  
→KCE →SES →Bibliografio →Antologio



## SOLOTURNO

Kantono en germanlingva, nordokcidenta Svislando (germanlingve: Solothurn, mallong. SO: 791 km<sup>2</sup>, 248'100 loĝantoj/2005). Ĉefurbo: Solothurn.

Eo disvastiĝis en la soloturna kantono ekde 1905 dank' al la fervoro de Fr. Walther, konduktoro. La 8an de februaro 1906 en la restoracio Rosengarten estis fondita la *soloturna* EG kun la sekvanta komitato: Coray, instruisto en la instituto Wengistein (prezidanto), Walther (sekretario) kaj J. Affolter, poŝtisto (kasisto). Fine de 1907 SES nombris 13 adresojn en la kantono. La soloturna EG daŭre funkciis en 1929/30 sub la prezido de *Robert Jenni*, instruisto, UEA-delegito en 1927.

Ekde 1907 unue Eo kaj poste ĉefe Ido estis propagandata de →*Friedrich Schneeberger* (1875-1926), kiu vivis kaj laboris en Lüsslingen/SO, protestanta komunumo en la ĝenerale katolika kantono S., kaj kie aperis pluraj broŝuroj (→Bibliografio).

*Svisa Espero* en 1939 raportis, ke sub la gvido de *Walther Born*, trajnestro, la loka grupo kunvenis regule dufoje monate, kaj ke dum la pasintaj 11 jaroj Eo estis instruata al pli ol 150 personoj. Malgraŭ tiu sukceso restis nur 15 anoj en la grupo.

La soloturna EG estis restarigita en majo 1967 de *Doris Schmid* (\*1921), kiu loĝas en Zuchwil/SO. Post la gimnazio en Lucerno, germanistikaj studoj en la universitatoj de Bazelo, Friburgo kaj Zuriko (doktoriĝo en 1946) kaj studrestado en Londono, Doris Schmid laboris kiel instruistino en duagrada lernejo en Wil/SG (1946-60). En 1960 ŝi translokiĝis al S., kie ŝi instruis la germanan, francan kaj anglan lingvojn en la lernejo de la komercista asocio. Lerninte Eon komence de la 1960aj jaroj ŝi ekrlatis kun SES kaj kunlaboris kiel protokolantino de ĝia CK kaj kiel anino de la ekzamena komitato de SES. En 1965 ŝi organizis la SES-tagojn en S. En 1969 okazis en S. seminario pri la instruado de Eo. Ŝia praktika Eo-agado daŭris ĝis 1974, UEA-delegitino ŝi restis ĝis 1987.



Jakob Schmid, Hector Hodler, René de Saussure kaj Edmond Privat en Soloturno (1909)



Jakob Schmid, Eduard Wenk, René de Saussure kaj Eduard Stettler en Soloturno (1909)



En 1909 okazis printempa festena Eo-kunveno de SES en S., kie la svisa Eo-eminentularo pozis antaŭ la fotisto sur la ŝtuparo de la katedralo. Kelkaj ekzempleroj de tiuj unikaj fotoj estas konservitaj (raporton vd. *SE* 5/1909). Oficialaj jarkunvenoj de SES okazis en S. en 1931, 1965 kaj 1969.

Laŭ *Vespera Horo* (n-ro 6/1910) en *Olten/SO* estis fondita EG de J. Bloch, laŭ alia fonto en 1924 de Paul Hofer (prezidanto) kaj →*Wilhelm Meister-Haase* (1885-1969), sekretario

kaj UEA-delegito. Meister estis profesia drogisto vivinta inter 1910 kaj 1930 en Olten. La EG estis renovigita la 27an de januaro 1938 laŭ iniciato de →Eduard Spielmann el Berno.



Doris Schmid

La komitato de la EG, kiu registris 18 membrojn, konsistis el Ernst Kissling (prezidanto), komercista oficisto en Wil/SO, Ernst Rheiner (vicprezidanto / kasisto), telegrafisto en Olten, kaj Heinrich Nägeli, komercisto en Aarburg/AG. Aliaj aktivuloj de tiu periodo nomiĝis Jean-Joseph Monin (vicprezidanto de la EG), Ary Stauffer (instruisto), Hermann Hattemer (teksaĵisto), Rita Leibundgut, Rosmarie Stampfli, Hannes Niederhauser, s-ro Ammann kaj s-ino Eberhard el Grenchen/SO. Jarkunvenoj de SES en Olten pasis en 1906, 1921 (?), 1927, 1971, 1992 kaj 1994. Ekde 2001 UEA-delegito en Oensingen/SO estas *Dieter Rooke* (\*1948).


### SPESMILO

Internacia decimala monunuo proponita en 1907 de la svisa matematikisto kaj planlingvisto →*René de Saussure* (1868-1943) kiel internacia helpa monsystemo. Laŭ tiu sistemo, 1 spesmilo/sm (= 10 spescentoj = 100 spesdekoj = 1000 spesoj) estis egala al 0.733 gramoj aŭ 0.02356 francaj uncoj da pura oro, 2.5259 orfrankoj aŭ 2.0031 britaj ŝilingoj aŭ 0.4874 usona dolaro aŭ 2.0461 germanaj markoj aŭ 2.5 svisaj frankoj aŭ 0.947 rusa rublo aŭ 0.979 japana eno. La radika unuo estis la spesoj. Ĝi estis tre malgranda por eviti onajn nombrojn. Antaŭmilite la mono estis

uzata de e-istoj, precipe de la t.n. *Ĉekbanko E-ista*.



Spesmilsignoj



Karikaturo pri René de Saussure montranta spesmilon



## **Eduard SPIELMANN**

1870-1938



Kiel junulo S. fariĝis dungito de la svisa poŝto kaj propraforte trapasis akademian edukiĝon, kiun li finis per doktoriĝo pri politikaj kaj ekonomiaj sciencoj, kaj sekve okupis gravajn administrajn postenojn ĉe la poŝt-entrepreno. Krome aktivis kiel lingvo-instruisto. Kiel demokrato li partoprenadis la politikajn agadojn en urbo, kantono kaj konfederacio en Berno kaj estis funkciulo de la berna sekcio de la Eŭropa Movado.

S., kiu verŝajne okupiĝis pri Volapük, lernis Eon ĉ. 1910. Sekve li verve propagandis Eon kaj gvidis Eo-kursojn, ĉefe en Berno, Lucerno, Olten/SO kaj aliaj lokoj, verkis multajn propagandajn artikolojn kaj ofte faris publikajn paroladojn pri Eo; tiel li esence kontribuis al la (re)fondo de pluraj lokaj EG kaj al la apero de novaj e-istoj. Precipe per sia →*Svisa Eo-Instituto* en Berno, kiun li fondis en 1933, li disvolvis vastan kaj efikan propagandan agadon. S. prezidis la bernan EG, sekretariis en SES. Kiel sperta poŝtoficisto li rolis kiel poŝtestro de la 9a UK (Berno 1913). Sub lia gvido ILEPTO kreskis kaj aliĝis kiel kolektiva membro al la Internacio de PTT. De 1928 S. redaktis ĉiusemajnan Eo-rubrikon por la periodaĵo de la svisa PTT- kaj dogana personaro kaj verkis ilustritajn gvidlibretojn pri Svislando (1923 kaj 1925). En 1934 S. vizitis la UK en Stokholmo kaj poste veturis tra Estonio al Leningrado kaj Moskvo. En 1936 li sugestis, ke UEA transformiĝu en Universalan Pacunion. Li persone konis L.L. Zamenhof, vizitis dudekon da internaciaj kongresoj, konferencoj kaj kunvenoj. Li multe klopodis por la okazigo de la 31a UK

(Berno 1939), kiun li ne ĝisvivis, ĉar li mortis kelkajn semajnojn antaŭ ĝia okazigo. Ioman skandalon li kaŭzis, kiam li publike atakis Edgar von Wahl (1867-1948) per la akuzo, ke la aŭtoro de la planlingvo Occidental-Interlingue plagiatis la verkon de Zamenhof – sed minaco tribunala flanke de la occidentalistoj instigis la akuzinton repreni sian plendon. La kroniklibro de la berna ES dediĉis al S. specialan paĝon kun foto, la oficiala mortanonco kaj la nekrologo aperinta en la berna gazetararo. Li estis kremaciita en la Bremgarten-tombejo. →Berno →Svisa Esperanto-Instituto →SES



## **ST. GALLEN**

Kantono en germanlingva, orienta Svislando (germanlingve: St. Gallen, mallong. SG: 2026 km<sup>2</sup>, 459'900 loĝantoj/2005). Ĉefurbo: St. Gallen.

*Urbo:* La EG *St. Gallen* estis la unua en Svislando, kiu estis oficiale aprobata de SES en 1904. Ĝi nombris 45 anojn. E. Werner, prezidanto de la EG, eldonis iun rondirantan membro-informilon, en 1906 li transloĝiĝis al Novjorko. Post tiu promesplena komenco kun abrupta fino, advokato J. Lehner kaj →*Hans Kürsteiner* (1885-1968) fondis novan lokan EG en 1909. Ĉi tiu grava svisa Eo-pioniro restis la ĉefa motoro de EG S. dum tre longa tempo. En 1929/30 la Eo-movado en S. estis reorganizita kadre de la *Nova EK*, kiu aperigis kvaronjaran bultenon sub la titolo *La Ponto*, kaj en 1931 estis raportite eĉ pri la starigo de la *junulara EG Verda Stelo*. La bulteno estis produktata de *Theodor Schneider* (1887-1948), profesia presisto, kiu tiam presis cetere ankaŭ la organon de SES, *Svisa Espero*, laŭ tre favora prezo, kaj tiel faris al la asocio grandan servon. Schneider, kiu estis ankaŭ fakulo pri filatelaĵoj kaj pentrado de familiaj blazonoj, oficis kiel kluba kasisto. Ĉar li estis e-isto entute dum pli ol 35 jaroj kaj tre ŝatata membro en la Eo-organizoj, SES kaj la loka EK elektis lin honora membro.



Ekskurso al Gebhardshöhe en 1913



Cseh-Kurso en St. Gallen en 1933



Rudolf Gottlieb Maeder

Dum la 1930aj jaroj la Nova EK estis gvidata de d-ro *Rudolf Gottlieb Maeder* (1900-1940), kiu aliĝis al la Eo-movado en 1928. 1932-37 li oficis kiel prezidanto de SES. Maeder kunlaboris kun la redakcio de *Internacia Medicina Revuo*, organizis diversajn lingvo-kursojn de Andreo Cseh kaj Tiberio Morariu kaj mem ofte prelegis.

Poste La Nova EK kunfandiĝis kun la ĝistima ES.



Kluba bulteno *La Ponto*



Membroj de la Nova Eo-Klubo St.Gallen (1928/29)

Post la frua morto de Maeder la asocian gvidon transprenis pioniro Kürsteiner, kiu dum la 1940aj jaroj ankaŭ oficis kiel prezidanto de UEA. En 1933, kiam okazis Cseh-kurso en S., lernis Eon → *Lina Reutemann-Klee* (1917-92). Ekde 1961 ŝi estis UEA-delegitino en sia urbo kaj en 1963 mem transprenis la prezidon de la EK (kaj poste fariĝis ĝia honora membro). Reutemann, ofte apogata de sia edzo *Karl Reutemann* (1910-79), kunorganizis multajn lokajn, regionajn kaj landajn kunvenojn, feriosemajnojn, prelegvojaĝojn por eksterlandanoj, ofte verkis artikolojn por diversaj gazetoj, donis multajn kursojn por komencantoj kaj progresintoj en sia urbo.

La geedza paro Reutemann estis helpata ĉefe de *Alice Früh* (1907-85) kaj *Elsa Krobath* (1893-1988). Alice Früh vizitis la komercan lernejon en S. kaj la kolecion de Rolle/VD kaj laboris kiel administra oficistino en la trafikkontrola ĉirkaŭaĵo de la svisaj fervojoj en S. En 1953 ŝi edziniĝis kun iu Theo Sigg. Früh aliĝis al la Eo-movado en 1931 post Cseh-kurso, akiris la superan diplomon kaj

mem iom instruadis Eon. Ŝi membris en la CK de SES, iom tradukis el svisaj verkistoj kaj kunlaboris kun → *Svisa Antologio*.



Esperantistoj de St. Gallen: gesinjoj Kürsteiner



Membroj A. Ueltschi, Schenzinger



E-istoj de St. Gallen: gesinjoj Reutemann-Klee



Promenado kun Hans Kürsteiner

Post la morto de Lina Reutemann la Eo-vivo en S. ĉesis ekzisti.

Aliaj membroj de la EK S. nomiĝis Frieda Schmidheiny (1926-1988) kaj Robert Langenegger (1871-1941), kiu estis iom konata pro la de li verkitaj poemoj; Lena Grütter-Häberli (1892-1987), Johannes Jüstrich (1906-88), kiu lernis Eon en la 1960aj jaroj, kaj kiu kutimis viziti la internaciajn fervojistajn Eo-konferencojn, kaj Gertrud Gamper (\*1914), e-istino de 1933 pere de Tiberio Morariu.



Membroj Th. Kutzli, Theodor Schneider



Alice Früh, Robert Langenegger



Esperantista kunveno en St. Gallen



Johannes Jüstrich, Leonie Sennhauser-Hunger kaj Ernst von May

*Kantono:* EG *Rorschach* estis fondita en 1910 kaj prezidata en 1914 de la vicurbestro Keller. EG *Gossau* estis iniciatita en 1929 de August Hoch. Tiu EG funkciis ankoraŭ en 1936. SE 3/1935 raportis ankaŭ pri la ekzisto de EG *Wattwil*.

Post kurso en novembro 1941 aŭ 1944 estis fondita EG *La Migrema Stelo* en la urbeto *Rheineck* laŭ iniciato de →Walter Kobelt (\*1910). Dum iu periodo la EG estis gvidata de →Fritz Liechti (1913-2001), sed ĝi disfalis post lia forveturo al Zuriko.

Tre specialan historion de la Eo-movado konas la urbo *Wil/SG*: Tie Eo ekĝermis en la jaro 1964, kiam la juna frizisto, poste psikiatria flegisto *Hans Kästli* eklernis Eon kaj volis enkonduki tiun lingvon en la praktikan agadon de la psikiatria kliniko *Wil*, en kiu li laboris. Lia devizo estis: „Eo en praktiko“. En tiu tempo la kliniko venigadis multajn gastlaboristojn el diversaj landoj (Italio, Jugoslavio, Turkio, Hispanio, Portugalio k.a.). Tiuj diversnaciaj kaj diverslingvaj laboristoj malfacile interkompreniĝis ne nur kun la pacientoj, kiujn ili devis flegi, kun la estroj kaj ankaŭ kun svisaj kaj nesvisaj gekolegoj kun kiuj ili laboris. Kästli kreis teamon,

kies membroj laŭ lia imago ne havus lingvajn problemojn almenaŭ en reciproka interkompreniĝado. Tio jam faciligus la laboron kaj plibonigus la flegadon de la pacientoj. Li organizis Eo-kurson en la kliniko kaj aperigis anoncon en Eo-gazetoj pri la ebleco labori en la kliniko inter e-istoj el diversaj landoj. Sekve el finintoj de la kurso kaj kun kelkaj gastlaboristoj fondiĝis EG en kiu oni perfektigadis en la lingvo por povi bone interkompreniĝi kaj en kiu oni lernis ankaŭ la germanan lingvon por kompreni la estrojn, la svisan personaron kaj la pacientojn, instruis flegadon al flegohelpantoj, kiuj ofte unufoje laboris en la flegado. Al tiu EG aliĝis poste e-istoj el *Wil* kaj ĉirkaŭaĵo, kiuj ne laboris en la kliniko, sed volis praktiki la internacian lingvon. Unue la grupon gvidis Hans Kästli, ekde la jaro 1975 *Hildegard Schoch* (\*1926). Tiam la grupo eknomiĝis *EK Wil*. Kiam en 1989 Schoch rezignis pri la ofico, kiel nova prezidanto estis elektita →*Stanislaw Pochanke* (\*1934), e-isto el Pollando, kiu vizitis la urbon unufoje en 1974 por labori dum dumonata restado en la kliniko, kaj kiu gvidis la EK ĝis 2005. Tiam li estis anstataŭita de *Verena Chaves-Walder* el *Flawil/SG* kaj de *Wolfram Fischer-Schmitter* el *Wolfertswil/SG*, kiuj ambaŭ elektiĝis kiel kunprezidantoj de la klubo. La e-istoj unue kunvenadis en la lernejo de la kliniko, poste en restoracio *Sonne*, sekve en restoracio *Schweizerhof* kaj de la jaro 2000 en la restoracio *Blumeneck* malantaŭe la stacidomo. La tuta familio *Pochanke* konsistigas la lokan EK: *Barbara Pochanke-Grzywa* (\*1944), kiu transloĝiĝis kun sia edzo de Pollando al *Wil* en 1987, kaj la gefiloj *Robert*, *David* kaj *Veronika* (*Vera*), ĉiuj denaskaj Eo-parolantoj. La 2an de junio 2004 EK *Wil* festis sian 40-jaran jubileon en la ĉeesto de 17 personoj. En la loka gazeto *Wiler Zeitung* aperis raporto pri tiu memorkunveno (vd. *SES informas* 4/2004).

En 1981 Kästli aĉetis en *Rheineck* la domon *Sonnenheim* (en Eo: →*Sunhejmo*) kun la celo transformi ĝin en e-istan tendumejon.



Jubilea kunveno de EK Wil kun la prezidintoj Hans Kästli, Hildegard Schoch kaj Stanislaw Pochanke



Hildegard Schoch kaj Alexander Thaler



Stanislaw Pochanke, Barbara Pochanke-Grzywa kaj filino Vera

En 1976 aliĝis al EK Wil *Ernst von May* (1922-2004) en Oberuzwil/SG. Ĉi tiu maŝin-inĝeniero HTL iam estis membro de la komunuma konsilio de sia loĝloko kadre de la liberaldemokrata partio, prezidanto de la loka porprofesia lernejo, kaj li deĵoris kiel oficiro en la svisa armeo. Eon li eklernis en 1963, ĉar kiel inĝeniero pri normigado li interesiĝis pri normigita lingvo. Longan tempon von May estis je la dispozo al la EK Wil kiel ĝia sekretario. En 1988, la iama delegito de UEA akceptis la taskon de kasisto de SES. Proksimume en 1964 Eon lernis ankaŭ Leonie Sennhauser-Hunger (\*1931), kiu aktivis en EK Wil ĝis ĉirkaŭ 1974. Alia aktiva e-istino nomiĝis Lilo R. Wigert.



Parto de la Eo-prospekto pri St. Gallen (ĉ. 1963)

Al la EK Wil apartenis ankaŭ *Alexander Thaler-Schneider* (1923-92). Thaler faris la abituriantan ekzamenon en la friburga kantona gimnazio, studis teologion kaj filozofion en diversaj universitatoj kaj fariĝis instruisto en duagrada lernejo. Ekde 1973 li loĝis en Ebnat-Kappel/SG, kie li okupiĝis pri Eo. Laŭ *Vespera Horo* tie jam en 1910 arĝis laboristoj por studi Eon.

En Ebnat-Kappel forpasis ankaŭ la fervojisto *Emil Zuberbühler* (1899-1987), unua vicprezidanto de SAEF en 1925. Lia profesia vivo kondukis lin tra la fervojaj stacioj de Nesslau, Herisau, Häggenschwil-Winden kaj S.-Haggen.

El la kantono S. devenis ankaŭ Emil Vonwiler (1887-1979), instruisto, kiu dum pli ol 30 jaroj estis membro de SES, kaj Emil Hess (1899-1974), Wattwil/SG, e-isto dum 40 jaroj. Dum la 1960-70aj jaroj, en Kaltbrunn-Benken/SG oficis kiel UEA-delegito Peter Jud, elektroteknikisto.

## **Madeleine STAKIAN-VUILLE**

1910-2004

## **Ardachès STAKIAN**

1909-1998



Madeleine S., kiu naskiĝis en la Chaux-de-Fonds/NE kiel la plej juna en familio kun kvin infanoj (la patro estis horloĝisto kaj membro de la movado Libre Pensée), kaj kiu venis al Ĝenevo en sia oka jaraĝo, vizitis la superan lernejon por junulinoj kaj la komercan lernejon en Ĝenevo, kie en 1927 ŝi diplomiĝis. Poste ŝi laboris en gazeta entrepreno kaj en banko. Apud sia profesio ŝi instruiĝis pri piano kaj orgeno, bekfluto kaj solfeĝo kaj kantis en ĥoroj kaj muzikinstruadis ne nur siajn filinojn, sed ankaŭ aliajn lernantojn.

Madeleine S. lernis Eon en 1927 kun sia frato Henri Vuille (1906-92), kiu estis pioniro de la naturamika movado en Svislando kaj kiu lernis Eon en la 1920aj jaroj, prezidante la Laboristan EG en Ĝenevo. 1934-36 S. mem laboris ĉe UEA en Ĝenevo kiel sekretariino kaj kontistino sub direktoro Kreuz. Kiel anino de la laborista Eo-movado Madeleine



Vuille prizorgis la bultenon *La Semanto*. Dum iu periodo ŝi forlasis la grupan agadon pro familiaj kaŭzoj por pli poste reveni kaj energie agadi kiel gvidantino de vesperaj kunvenoj per kantado kaj muzikado. 1957-94 ŝi prezidis la ĝenevan EG La Stelo kaj multajn jarojn redaktis ĝian organon *Brasikfolio*. Posedante la superan diplomon de Eo, en la 70aj jaroj ŝi estis anino de la ekzamena komitato de SES, kiu en 1978 elektis ŝin honora membro. Kiel UEA-delegitino kaj fakdelegitino pri muziko kaj aktiva apogantino kaj klientino de KCE S. fariĝis konata ankaŭ kiel Eo-poetino sub la pseŭdonimo *Mad Mevo*, verkante originale kaj traduke el la franca kaj germana lingvoj (ekz. tradukoj *Winterreise* de Schubert, de la *Cignokanto*, de francaj poemoj, kiuj aperis en →*Svisa Antologio* en 1939, kaj esperantigis svisajn (romandajn) popolkantojn. En 1930 ŝi fondis Eo-ĥoron, kiu prezentiĝis plurajn jarojn dum Zamenhof-festoj kaj en neesperantistaj medioj por propagandi Eon kaj pruvi la belsonecon de tiu lingvo en muziko.



Juna Madeleine Vuille





En sia aktiva periodo S. partoprenis multajn Eo-aranĝojn en- kaj eksterlande, ofte akompanata de sia armen-devena edzo *Ardachès S.* (1909-98), kiu en 1922 elmigris el Turkio (Istanbulo) al Svislando, kie li sekve laboris kiel diplomita (herb)drogisto kaj kiel farmaciisto kaj kie li akiris la svisan civitanecon. Li lernis Eon en 1931 kaj kiel komitatano aktivis en la ĝeneva EG La Stelo, plenumante diversajn gvidajn funkciojn.

→Ĝenevo →Laboristoj →Literaturo →UEA


### **STENOGRAFIO (ESPERANTA)**

S. estas kurtskriba maniero, per kiu eblas skribi tri- ĝis kvarfoje pli rapide ol per la tradicia longskribo. La pli altan rapidecon oni atingas per simpligita ortografio kaj per reduktado de la literaro je minimumo. Oftaj vortoj kaj silaboj estas kurtigitaj. Dum en germanlingva Svislando pli populara estis la sistemo de Stolze-Schrey, en la franclingva parto estis pli disvastigitaj la sistemoj de *Duployé* kaj *Aimé Paris*.

La stenografoj ĉiam montris sin tute favoraj al Eo, kaj reciproke la e-istoj kaj aliaj planlingvanoj subtenis la propagandon de la S. Precipe la sistemoj de Stolze-Schrey kaj Duployé estis aplikataj, propagandataj kaj adaptitaj ĉefe al Eo, Ido kaj Occidental, planlingvoj popularaj ĝuste en la epoko de S.


La unuaj publikigoj pri S. okazis en 1896: La revuo *Lingvo Internacia* aperigis artikolon pri la rilatoj, kiuj ekzistas inter Eo kaj S. En *Svisa Espero* 4/1904 oni povis legi artikolon pri la situacio de S. Unu el la plej fruaj e-istoj, →*Alfred Paul Dubois* (1853-1918),

instruis S. (Aimé-Paris) en la komerca lernejo de Le Locle/NE, same lia filino *Louise Dubois* (1881-1952) instruis S. en Le Locle laŭ la sistemo Aimé Paris, kiun ŝi provadaptis al Eo (1908). La e-isto →*Friedrich Schneeberger* (1875-1926), unue pastoro kaj poste profesia stenografo (Stolze-Schrey) ĉe la soloturna kantona konsilio kaj ĉe la svisa parlamento, estas konsiderata kiel pioniro de la esperanta S. En 1903 li aperigis kvarpaĝan *Resumon de la esperanta S.*, verkitan laŭ la sistemo de Stolze-Schrey. Dua kaj tria eldonoj de la sama resumo, kun kelkaj sistemmodifoj, eliris ĝis la jarfino. Schneeberger ankaŭ fondis la esperantan S.-rondon por praktikado kaj ekzercado de la S. En 1904 li verkis kaj eldonis laŭ la stenografiaj notoj la raporton, aperintan en Laufen, pri la 1a UK en Bulonjo-ĉe-Marco (1905) kaj postskribis ankaŭ la oficialajn paroladojn de la 2a UK en Ĝenevo laŭ la sistemo Stolze-Schrey. Samjare aperis lia lernolibro de S. En 1906-08 Schneeberger redaktis la organon de la Eostenografoj *Flugila Stelo*. Lia kolego Joseph Feierabend (+1947), oficisto en la ĝenerala direkto de la svisaj fervojoj (SFF) en Berno, e-isto kiu transiris al Ido, same profesie uzadis S., en ambaŭ planlingvoj. La unuaj adeptoj de la laŭzana kaj vaŭda Eo-movadoj fontis el stenografiaj, administraj kaj komercistaj cirkloj, kaj la stenografia societo de Laŭzano ofertis Eo-kursojn. Ankaŭ la sekvaj e-istoj aŭ idistoj uzadis S., en Eo respektive en Ido: Rudolf Hiestand (1874-1930), idisto en Zürich-Höngg (Stolze-Schrey), →Adolphe Creux (1876-1933), filologo kaj katolika pastro en Rue/FR (Duployé); →Wilhelm Haase (1885-1969), drogisto en Burgdorf/BE (ekde 1909), Olten (1910-30) kaj poste en Chur; →Alfred Bader (1889-1968), kuracisto, gvidinto de la bazela Eo-movado kaj fondinto de internacia stenografia societo, kaj Heinrich Georg Rotach (1894-1988), profesia komerca oficisto en Wabern, e-isto de la jaro 1930 kaj prezidinto de la berna ES, aplikadis la S. laŭ Stolze-Schrey; la idisto →*Marcel Pesch* (1893-1970), stenografo ĉe la Internacia Laboroficejo en Ĝenevo, inventis propran kursivan Ido-S. En 1931 Robert Kreuz ricevis en svisa S.-kongreso de la sistemo Stolze-Schrey en Rütli premion por S. je rapideco de 220 silaboj.



Titolpaĝo de *Flugila Stelo*


Adolphe Moeckli (1899-?), oficeja direktoro, reprezentanta la tajpilojn Hermes de la firmao Paillard & Co. SA en Laŭzano, en 1932 adaptis la planlingvon Occidental al la S. de Stolze-Schrey, kaj la occidentalisto Charles Piaget (+1943) en Biel-Bienne publikigis artikolojn pri tiu planlingvo en *Revue Internationale de Sténographie* (Aimé Paris). Kiel kulminon de S. en Eo oni povas konsideri la aperon de la lernolibro *Universala Eo-Stenografio Unesteno* (Zürich 1965), kiu estis Eo-adapto de la sistemo Stolze-Schrey. La aŭtoroj de la verko nomiĝis →Johannes Jakob Sturzenegger (1927-85) kaj Heinrich Matzinger (1898-1984).



Stenido, Lernilo di la Stenografo di la linguo internaciona IDO


Dum Sturzenegger estis prokuristo en Zuriko, kiu dum sia plurjara laboro en eksterlando uzadis la S. profesie kaj private en pluraj nacilingvoj, Matzinger laboris kiel instruisto pri skribado kaj S. ĉe la kantona komerca lernejo de Zuriko (1929-62), aplikante diversajn sistemojn. Tribunaloj, policaj instancoj, universitatoj kaj privatuloj konsultis la unikan fakulon kaj liajn stenografiajn lernolibrojn por diversaj lingvoj (germana, angla, franca, itala, hispana). Matzinger lernis Eon nur 70-jaraĝa kaj estis membro de la zurika ES. Dum la 1970aj jaroj li apartenis al la Komisiono Eo Lernejen de KCE, kies agadon li aktive partoprenis.

La vaŭda e-istino Lucienne Dovat (\*1919) estis provlernantino de Sturzenegger pri Unesteno kaj fariĝis la baptopatrino de la libro Unesteno. Dovat korespondis ankaŭ kun la sekretario de Konrad Adenauer, e-isto kaj uzanto de tiu S.



Esperanto-stenografio






Titolo de la lernolibro *Unesteno* (1965) ...



... kaj tekstaj specimenoj el tiu libro

## Eduard STETTLER

1880-1940



S. apartenis al familio patricia (S. zu Ober-Gerwern), origina el la vilaĝo Stettlen/BE. Li studis juron, sociologion, komercon, muzikon kaj librotenanadon, vizitis la universitatojn en Heidelberg (Germanio) kaj Berno. Kiel materie sendependa fraŭlo S. evidente ne tro bezonis profesian mongajnon kaj dediĉis sian vivon al la laboro en pluraj filantropiaj movadoj: jen kiel ano de la studenta unuiĝo Zofingia, jen kiel membro de la Societo por la germana lingvo, kie oni estimis lian humurplenan kritikadon de la bernaj dialektoj (aŭ ĵargonoj). Li estris la bernan patrician gildon Ober-Gerwern de 1923 ĝis la morto kaj direktis ankaŭ la lokan muzikan societeton Metallharmonie. Unu-flanke S. estis pasia aŭtomobilisto kaj arda tabak-fumanto, aliflanke decida malamiko de la alkoholo - tiucele li fondis la resanigejon Nüchtern. Lia hejmo en Bundesgasse 16 (hodiaŭ en posedo de la gildo Ober-Gerwern, kiu instalas apartan Eduard-S.-Fondaĵon) servis kiel fuĝejo por multaj homoj, kiuj bezonis ian konsilon aŭ helpon de S., kiu malavare donacis monon al bonfaraj institucioj.

S. lernis Eon en 1908 en Berno pere de → Jakob Schmid. Aliĝinte al UEA (dumviva membro, UEA-vicdelegito en Berno kaj UEA-komitatano), li venis en 1909 al Ĝenevo por helpi al → Hector Hodler en la starigo de UEA (fond. 1908) en ĝia oficejo ĉe la borsa strato. Sekve S. kariesis en tiu organizo, okupante la postenojn de UEA-vicdirektoro (1910/11-19), direktoro kaj fine prezidanto de la asocio (1920-24 kaj 1928-34). La „juristo de UEA”, kiel S. estis nomita, verkis la statuton de UEA de 1920 kaj

1934 kaj estis respondeculo pri la Universala Esperanta Librejo de UEA en Ĝenevo. Post la morto de Hector Hodler en 1920 S. heredis de lia vidvino la rajtojn je la revuo *Esperanto*, je la biblioteko kaj ricevis valorpapirojn kiel kapitalon por sekurigi la estontecon de la asocio. Kiam en 1934 la gvidantoj de UEA estis ŝanĝitaj, →Edmond Privat kaj Andreo Cseh ne reelektitaj kiel UEA-estraranoj, proteste ekŝiĝis ankaŭ S. Pro liaj meritoj UEA nomis lin honora prezidanto.

S. plenumis ankaŭ la taskon de la prezidanto de SES (1911-13 kaj 1927-32), membris en ĝia ekzamena komitato, ellaboris la statuton de SES kaj rolis kiel bibliotekisto. Li estis membro de la akcepta komitato de la 9a UK (Berno 1913), gvidis Cseh-kursojn en Svislando kaj aŭtoris la biografion *Hector Hodler - lia vivo kaj lia verko* (Ĝenevo 1928, represo Hago 1982). Krom kelkaj literaturaj tradukoj S. skribis ankaŭ grandan nombron da prifakaj artikoloj. *EdEo* (1933) skribis pri la nekutimaj fortoj kaj trajtoj de S., kiu estis konsekvenca en sia sinteno kaj precizega en detaloj, ne timanta ataki diletantecon kaj tial riskanta kritikon kaj izoligon, jene: „S. alportis la svisan prudenton, trankvilan prijuĝon, kelkfoje embarasigan ĝisfundecon. Juristo klarvida, li tuj komprenis la malfortecon de la movada strukturo kaj en la kadro de UEA serĉis realigi tion, kion li spertis en aliaj societoj, kun kiuj li kunlaboris libervole. Lia nomo do aperis kiel sobra realigisto de eblecoj fareblaj. Liaj raportoj legataj nur de malplimulto en la movado ankoraŭ nun estas fonto de utilaj pensoj, spertoj kaj observoj“.

→Universala Esperanto-Asocio →Berno →SES  
→Antologio

### **STRATOJ, PLACOJ, TABULOJ, ALIAJ EO-MEMORAĴOJ**

Ĝis nun nur tri publikaj lokoj en Svislando ricevis la nomon de Eo: *Esperantoweg* en Romanshorn/TG (1965), *Piazzetto Esperanto* en Locarno-Solduno/TI (1985) kaj bushaltejo *Gymnase-Espéranto* en La Chaux-de-Fonds/NE (1980-90aj jaroj).

La 25an de septembro 1965, kadre de la trilanda renkontiĝo en Romanshorn, okazis la inaŭguro de *Esperantoweg*. La solenajon partoprenis oficialaj reprezentantoj de la

lokaj komunumaj instancoj kaj 116 e-istoj el 7 landoj. La iniciatinto de tiu unua Eo-S. en Svislando estis →Otto Walder, kiu loĝis en tiu strato (oficiala adreso: Eigenheim ĉe la stratkruciĝo Waldmannstrasse / Scheffelstrasse). La propono de Walder estis aprobita de la komunuma estraro kaj de la loĝkoooperativo de la trafika personaro, sur kies grundo parte troviĝis la nomita strato La inaŭguron ĉeestis ankaŭ Erwin Schwendinger (1911-95), socialdemokrata nacia konsilisto (1955-74) kaj kantona registara konsilisto el Herisau/AR. La muzika societo de Romanshorn, 30-persona harmonia blovenssemblo, ludis la Eo-himnon La Espero, kaj la cidra fabriko Hungerbühler el Romanshorn regalis la partoprenantojn per sia Blauacher-suko.

La 27an de aprilo 1985 estis inaŭgurita *Piazzetta Esperanto, lingua internazionale*, sur centra placo en Solduno, kvartalo de Locarno. Kun la urbestroj de Locarno/TI kaj Verbania (Italio) kaj unu membro de la tiĉina registaro (Carlo Speziali, estro de la departemento pri edukado) ĉeestis trideko da aliaj solenantoj el diversaj partoj de Svislando, ankaŭ →Tazio Carlevaro en la nomo de la tiĉinaj e-istoj, Alfonsito Varini, prezidanto de GRESLO, →Arthur Baur, prezidanto de SES. La orkestro Remigia ludis la himnon La Espero, aperitivo estis donita en apuda restoracio. La tiĉina gazetaro detale raportis pri la evento, kies iniciatinto estis →Dante Bertolini. La 12an de oktobro 2002 la nomo de la placo estis ŝanĝita kaj ricevis la nomon honore al la mortinta e-isto →Dante Bertolini.

En La Chaux-de-Fonds, la trolebusa haltejo *Gymnase* apud KCE dum iu tempo portis la kroman nomon *Espéranto*. La nomo malaperis en la 90aj jaroj.

Alia grava Eo-atentigilo en publika loko estas la memortabulo pri L.L. Zamenhof en Ĝenevo (strato Vieux-Collège 6) kun jena teksto: „En tiu domo loĝis en 1905 L.L. Zamenhof, iniciatoro de la lingvo Eo“. (→L.L. Zamenhof en Svislando)

La tomboŝtono de →Fritz Schwarz en Thun portis la verdan stelon, kaj survoje de Les Brenets al Saut du Doubs en la Neŭŝatela Ĵuraso estas videbla sur roko verda Eo-stelo, kiun laŭ rakonto siatempe pentris →Edouard Ducommun.



Iama Esperantoweg en Romanshorn




Inaŭguro de Piazzetta Esperanto en Solduno, en 1985, kun d-ro Arthur Baur, tiama prezidanto de SES.



Bushaltejo en La Chaux-de-Fonds: Gymnase-Espéranto

## Georges STROELE

1879-1943



S. estis neŭŝatela instruisto en duagrada lernejo kaj aktivulo en instruistaj asocioj, krome li rolis ankaŭ kiel delegito de la Departemento pri publika instruado de la kantonu Neuchâtel. Li estis ano de la socialista partio. S. estis la frato de *Hermann S.* (1880-1921), kiu laboris kiel astronomo ĉe la neŭŝatela observatorio kaj docento de la neŭŝatela universitato.

S., kiu uzis la pseŭdonomon *Goso*, apartenis al la unua generacio de svisaj e-istoj kaj plej aktivis en la tempo de la unuaj UK. Li estris la lokan EG (Couvet), kuniciatis kun sia frato Hermann (1880-1921) la neŭŝatelan ES, gvidis Eo-kursojn, membris en la CK de SES kaj estis prezidanto de la ekzamena komitato de SES.

En aprilo 1922 S. verkis kun →Edouard Ducommun la raporton pri la internacia konferenco pri la instruado de Eo en la lernejoj en Ĝenevo, kiu estis transdonita al la Departemento pri publika instruado de la kantonu Neuchâtel. La fratoj, kiuj apartenis al la Lingva Komitato, tradukis diversajn verkaĵojn el la franca literaturo (Arnoux, Musset), kiujn publikigis *La Revuo* kaj *Esperanto*, kies ĉefa recenzanto Georges S. longe estis. Krome li kunlaboris kun la redakcio de *EdEo*, en kiu li estas biografiita. En *Rimportretoj* Kálmán Kalocsay verkis la jenajn strofojn pri Georges S.:

*Stroele, el recenzista gildo  
Kareas ame ĉiun belon,  
Kvankam atentis la nivelon,  
Recenzas li kun kora mildo.*

*Jen certe lia blazonŝildo:  
Plumo trempita en mielon.  
Stroele, el recenzista gildo  
Karesas ame ĉiun belon.*

*“Poeto estas orfa birdo,  
Soifas varmon kaj sunhelon”  
Li pensas – “for do la kruelon.”  
Ĉu mi eraris pri la bildo:  
Stroele, el recenzista gildo.*

→Neuchâtel

**Johannes Jakob STURZENEGGER**  
1927-1985



S. estis prokuristo en Zuriko. Iam li kunlaboris kiel administranto de la Serva Centro de UEA en Ĝenevo, li estis komitatano de UEA kaj ĝia fakdelegito pri Eo-stenografio. Dum sia plurjara laboro en eksterlando li uzis la stenografion profesie kaj private en pluraj nacilingvoj. En tio li malkovris la problemojn de nacilingvaj stenografi-sistemoj por la internacia uzo. Por kontribui al la plibonigo de tiu situacio, en 1965 li eldonis kun →Heinrich Matzinger la ampleksan lernolibron *Universala Eo-Stenografio Unesteno* (Zürich 1965). Kiel vera poligloto S. interesiĝis ne nur pri lingvoj kaj internaciaj rilatoj, sed ankaŭ pri la filozofio de Kriŝnamurti, pri la uzado de la sunenergio, pri la reformo de la germana ortografio ktp. Krom tio li kunlaboris en la preparado de la tria eldono de *Zürichdeutsches Wörterbuch*.

→Stenografio

## SUNHEJMO

En la 1960-70aj jaroj la svisa e-isto *Hans Kästli* agadis kadre de la kliniko por invalidaj gejunuloj en Wil/SG, klopodante krei kuracostacion, kie laborus precipe e-istoj. Fakte en 1972/74 li parte sukcesis realigi tiun projekton - en unu klinika sekcio laboris pluraj e-istoj el diversaj landoj.

En 1981 Kästli aĉetis en *Rheineck* la domon *Sonnenheim* (en Eo: *Sunhejmo*), bienon de preskaŭ 10'000 km<sup>2</sup> sur 450 metroj super la marnivelo, kun la celo starigi Eo-centron por flegi problemajn infanojn kaj handikapitajn gejunulojn kaj laborigi tie e-istojn. Temas pri malnova, pluretaĝa domo kun 35 ĉambroj, kun ĝardeno, herbejo kaj arbareto. Kästli transformis la bienon al feriejo por psike kaj korpe handikaptitaj personoj, kiuj bezonas ĉiutagan prizorgadon rilate korpan flegadon, manĝojn kaj aliajn servojn. La origina ideo de la *E-ista Tendumejo*, kiel S. ankaŭ estis nomata, baziĝis kvazaŭ sur la sistemo de kibuco kun la celo enkonduki simile intiman etoson kiel ĝi regas en diversaj Eo-centroj kiel KCE, Grésillon, Bona Espero k.s. Kvankam tiuj centroj servis kiel modelo, ideo kaj infrastrukture, kunlaboro kun ili tamen ne okazis pro diversaj kialoj, praktikaj kaj ideaj. La kerno de la 'ideologio' de S. baziĝis sur kelkaj ekkonoj aŭ konscioj, kiujn oni volis praktiki, observi, studi, sperti: laŭ propraj klarigoj koncerne la praktikadon de Eo oni konstatis, ke en la ĉiutaga uzado montriĝas tro malgranda vortrezoro je dispono kaj ke dum la laborado ĝenas la malrapideco de trafa esprimado. Krom tio oni estis konscia, ke dum la kunvivado e-istoj estas nek anĝeloj, nek superhomoj, kaj ke vole nevole aperadas konfliktoj inter ili. Rilate la feriejon por handikapitoj oni celis ian sencoplanan okupon, kiu estas samtempe humanisma. Ĉar Eo-hotelo bezonas servistaron, kiu parolas Eon, S. ofertis sin kiel feriejon por gesamideanoj kun deĵorebloj, kvankam oni komprenis, ke ne ĉiuj homoj emas aŭ povas labori kun handikapitoj. La eventualan financan deficiton de la entrepreno S. klopodis kovri per ricevotaj mondonacoj aŭ per nesalajrado de la laboroj faritaj de volontuloj. Sed tamen S. antaŭvidis engaĝi parte salajratan dungiton kaj funkciigi la gastejon Pierre Céréssole, laŭ la nomo de la fondinto de →Civilservo Interna-

cia. Plurfoje okazis en S. diversaj Eo-aranĝoj, precipe en la tempo kiam →Dietrich Weidmann rezidis tie (1980aj jaroj). Post 1987 Kästli demisiis de SES (pro solidariĝo kun →Kurt Greutert, kiu estis eksigita el tiu organizo) kaj distanciĝis de la svisa Eo-movado. Iom post iom la e-ista dimensio de S. malfortiĝis.



La konstruaĵo de Sunhejmo en Rheineck



Sunhejmo en Rheineck, malantaŭe la Lago de Konstanco

### **SVISA ANTOLOGIO (1939)**

Signifa antologia verko pri la traduka Eo-literaturo. La S. estis la sepdeknaŭa libro eldonita de la eldonejo Literatura Mondo de Vilmos Bleier (1903-40) en Budapeŝto (Hungario) kaj la tria libro de la AELA-serio de 1936/37. La ĉefredaktoro de la S., →*Arthur Baur* (\*1915), kiu estis membro de Asocio de E-istaj Libro-Amikoj AELA, oficiale kunlaboris H. Blaser, R.A. Dasen, Alice Früh, Hilda Dresen, H. Hammer, →Marcel Jaccard, Y. Jaccard, Kálmán Kalocsay, Mad Mevo (t.e. →Madeleine Stakian), →Edmond Privat, Charles Rosen, →Heidi Baur-Sallenbach, →Jakob Schmid kaj →Friedrich Uhlmann.

Komence de la libro estas presita averto, ke „ĉi tiu libro aperas dank’ al la senlaca kaj senprofita kunlaborado de sinjoroj: H.G. Rotach, prezidinto de SES, Jakob Schmid kaj Otto Walder, parte de la SES Bern, Universala Esperanto-Kongreso en Bern”.



Titolpaĝo de la *Svisa Antologio*

La S. ampleksas 540 paĝojn kaj dividiĝas en ĝenerala enkonduko kaj en enhavaj partoj

alemana (germanlingva literaturo), velŝa (franclingva, romanda literaturo), tiĉina (itallingva literaturo) kaj romanĉa kun po unu parto kun prozo kaj poezio. Ĉiun lingvan parton antaŭas ĉapitro kun klarigoj pri la historio de la koncerna literaturo (Arthur Baur verkis, krom la ĝenerala enkonduko, ankaŭ la ĉapitrojn pri la alemana kaj romanĉa literaturoj, dum la artikoloj pri la franca kaj itala estas skribitaj de Henri Blaser kaj Giuseppe Zoppi).

La germanlingva (alemana) parto enhavas, krom kelkaj kantoj kaj folklorajoj, tradukaĵojn de la sekvaj aŭtoroj: Aegidius Tschudi, Thomas Platter, Felix Platter, Albrecht von Haller, Salomon Gessner, Ulrich Bräker, Heinrich Pestalozzi, David Hess, Ulrich Hegner, Jeremias Gotthelf, Jakob Burckhardt, Gottfried Keller, Conrad Ferdinand Meyer, Carl Spitteler, Adolf Frey, Lisa Wenger, Jakob Christian Heer, Adolf Vögtlin, Jakob Bosshart, Meinrad Lienert, Heinrich Federer, Rudolf von Tavel, Ernst Zahn, Alfred Hugenberg, Simon Gfeller, Johannes Jegerlehner, Paul Ilg, Carl Friedrich Wiegand, Maria Waser, Konrad Falke, Felix Moeschlin, Robert Faesi, Emanuel Stickelberger, Gustav Renker, Max Pulver, John Knittel, Meinrad Inglin, Hermann Hiltbrunner (prozo), G.J. Kuhn, J.A. Henner, Ch. Wiedmer, Johann Gaudenz von Salis-Seewis, Johann Martin Usteri, Ferdinand Dranmor, Heinrich Leuthold, Gottfried Keller, Conrad Ferdinand Meyer, Fridolin Hofer, Dominik Müller, Gertrud Bürgi, Gertrud Pfander, Max Geilinger, Robert Faesi, Karl Stamm, Leo von Meyenburg, H.W. Keller, Paul Ad. Brenner, Albert Ehrismann, Emile Gerber kaj Max Amstein (poezio).

La franclingva (velŝa) parto estas reprezentita de Jean-Jacques Rousseau, Madame de Staël, Benjamin Constant, Rudolphe Toepffer, Henry Frédéric Amiel, Eugène Rambert, Auguste Bachelin, Madame T. Combe (alias Adèle Huguenin, kiu mem estis e-istino), Edouard Rod, Philippe Monnier, Benjamin Vallotton, Frédéric Gonzague de Reynold, Robert de Traz, Jacques Chenevière, Noëlle Roger kaj C.F. Ramuz (prozo), Etienne Eggis, Edouard Tavan, Philippe Godet, Charles d'Eternod, Jules Cougnard, Henry Warnéry,

Alice de Chambrier, Louis Duchosal, Henry Spiess kaj René Louis Piachaud (poezio).

Por la itallingva (tiĉina) parto estis elektitaj Romeo Manzoni, Giovanni Anastasi, Angelo Nessi, Francesco Chiesa, Giuseppe Zoppi kaj Valerio Abbondio. Kaj la romanĉa parto prezentas verkojn de Gian Antoni Büchler, Giachen Michel Nay, Conradin de Flugli, Gian Antoni Huonder, Giachen Caspar Muoth, Andreo Bezzola, Gian Fadri Caderas, Gudench Barblan, Eduard Bezzola kaj Peider Linsel. Aldonita estis listo de 37 vortoj netroveblaj en PIV. La prezo de la libro, kiu estis printita en Hungario, estis 7.70 svizaj frankoj kaj mendeblis ĉe Heinrich Georg Rotach en Wabern BE.

Kiel Arthur Baur rakontis en *LF 177/1999* pri la aventureca estiĝo de la S., la presado de la libro estis antaŭvidita en Hongkongo en la komenco de 1938. Bedaŭrinde la manuskripto dume perdiĝis aŭ pereis, kaj Baur estis petita de Bleier denove kompili la saman manuskripton kaj konsolita kun la promeso, ke la libro estos presita en Hungario. Pro politikaj kialoj fine de 1938 Bleier mem translokis sin kaj sian firmaon al Parizo. Post energia interveno de la SES-funkciuloj Rotach, Schmid kaj Walder, kiu respondecis pri la UK en Berno en 1939, la libro mirakle rapide aperis.

En *Svisa Espero 4/1939* aperis jena komento, subskribita de L(illy) Sch(aerer):

„Malgraŭ perdiĝo de manuskriptoj de la tradukaĵoj kaj multaj aliaj (teknikaj kaj financaj) malfacilaĵoj, la eldonfirmao Literatura Mondo en Budapeŝto kaj Parizo ne senkuraĝiĝis kaj, post ricevo de novaj manuskriptoj kaj parta reverko, rapidis presigi la S. por ebligi al la eksterlandanoj ekkonigi ĝin dum la berna kongreso. Verŝajne ĝuste pro tiu rapido, la verko montras mankojn en la ekstera aspekto. La kovrilo ja plaĉas, sed la interno iom mallogas. Unue, la tipografio ne atingas la svizan 'standardon'. Tio estas okulfrapa kaj ĉiu aĉetanto bedaŭras tiun mankon, kiu cetere gravas por la propagando. Ankaŭ la papero ne indas. Fine, la verko enhavas multe tro da preseraroj, precipe en la titoloj kaj en la romanĉa parto.” La enhavo tamen estis laŭdita: „La eldonfirmao, konata pro sia emo je enkonduko de neologismoj, lasis tamen la tradukantojn elekti tute libere esprimojn kaj

terminojn. Kapabla kompetentulo, d-ro Szilágyi, revidis tamen la manuskriptojn por garantii ian literaturan unuecon. (...) Ni akceptu ĝin bonhumure, ĉar ĝi estas nia 'orlibro'." *SE* 1/40 menciis, ke la S. estis donacita de SES al kvin svisaj bibliotekoj: en Aarau, Bazelo, Ĝenevo (Ligo de Nacioj), Neuchâtel kaj Soloturno. Malgraŭ tiuj obstakloj Baur memoris, ke la S. eĉ bone vendiĝis dum la kongreso. Dank' al la memoro de Baur ni scias, ke dum la milito bombo detruis grandan parton de la stoko en kelo, tiel ke oni ne scias kiom da ekzempleroj el la tuta eldonkvanto de 1100 estis perditaj. Pro tio la libro fariĝis malofte brokantaĵo. En la unuaj numeroj de la revuo *Literatura Mondo*, la S., kies prezo estis 4,6 usonaj dolaroj (broŝurita 4 dolaroj), estis anoncita kiel unu el la plej imponaj verkoj de la Eo-literaturo. Pozitive recenzon skribis postmilito I.L. Tárkony, kiu miregis pri la „kvarcentjara literaturo de kvarlingva popolo” kaj laŭdegis la altan kvaliton de la Eo-tradukoj.

→Literaturo (beletra)

### **SVISA ESPERANTO-INSTITUTO**

La S. estis fondita en Berno la 1an de novembro 1933, interkonsulte kun UEA kaj SES, fare de →*Eduard Spielmann* (1870-1938), ĉe ties loĝadreso (Gesellschaftsstrasse 39), kun jena celaro: propagandi Eon en privataj, komercaj kaj administraj rondoj de Svislando; organizi propagandajn paroladojn kaj Eo-kursojn, prefere Cseh-metodajn, en urboj kaj grandaj vilaĝoj kie ankoraŭ ne ekzistas EG, aŭ kie la EG deziras ĝian kunlaboron; informi pri la disvastigo, avantaĝo kaj utilo de Eo en la internaciaj komercaj, vojaĝaj, administraj kaj kongresaj rilatoj; organizi karavanojn al UK; peri ĉiuspecajn internaciajn informojn pri komerco, industrioj, trafikoj, vojaĝoj kaj postenoj el eksterlando; traduki el kaj en Eon kaj redakti komercajn kaj trafikajn prospektojn en Eo; organizi rabatitajn vojaĝojn tra Svislando kaj unu- ĝis trisemajnjan libertempadon kun turisma, sporta kaj ripoza celoj en Svislando por eksterlandaj e-istoj kaj aliaj personoj, laŭdezire kun svisa Eo-ĉiĉerono; peri abonojn kaj aĉetojn de Eo-gazetoj, libroj kaj signoj (*SE* 1/1934); enkonduki Eon en la lernejojn, trafiko-, polico-

dogano- kaj radio-administrejojn, turisman industrion.

En sia unua raporto en *SE* 2/35 Spielmann menciis, ke li verkis gazetartikolojn kaj sendis al ĉiuj membroj de la Federacia Konsilio (svisa registaro) kaj al la delegitoj de gravaj asocioj propagandilojn kaj rekomendojn de Eo. Dum 1934 la S. ricevis 87 leterojn, 61 poŝtkartojn kaj 42 cirkulerojn de informpentantoj el diversaj landoj, precipe Svislando. En 1935 Spielmann aperigis 34 gazetartikolojn en la svisa kaj internacia Eo-gazetaro kaj organizis Eo-karavanojoaĝojn, gvidis kursojn, ekspedis 1500 Eo-propagandilojn kaj varbis multajn eksterlandajn e-istojn por traveturo tra CH. Kun la morto de Spielmann en 1938 la agado de la S. finiĝis.



Eduard Spielmann kaj Hanni Fischer-Buri

La S. estis restarigita en novembro 1954 de →*Hanni Fischer-Buri* (1894-1961) en Breitenrainstrasse 12 en Berno post ties retiriĝo kiel hotelestrino. La S. daŭrigis servi kiel movada informejo kaj perkoresponda instrua centro, per kiu estis tenitaj kontaktoj kun diversaj politikistoj, ekzemple lige kun la Eo-kampanjo kadre de Unesko. Kun →William Perrenoud Hanni Fischer kreis ankaŭ la fundamenton por la feriokursoj en →Kastelo Münchenwiler/BE, kiujn ŝi administris kadre de la S. Post la tro frua morto de Hanni Fischer en 1961 la S., kiu ĝuis subvencion de SES, ĉesis funkcii definitive.

→Berno →Kastelo Münchenwiler →SES

## SVISA ESPERANTO-REVUO

Iama oficiala organo de Svisa Esperanto-Societo (SES), daŭriginto de →*Svisa Espero*. S. aperis inter 1973 kaj 1990. Ĝiaj redaktoroj estis: 1973-79: →Paul Bächli, Johann Lutz, →Otto Walder, Bertrand Pilloud; 1979-80: István Mórocz; 1980-86: →Arthur Baur; 1986-87: Tyburcjusz Tyblewski, →Claude Gacond, Stefano Keller, →Michel Frésard, →Andreas Künzli; 1988-90: →Andres Bickel. Ekde 1991 ĝi estis daŭrigita de →*Svisa Esperanto-Societo Informas*.  
→Bibliografio (gazetaro) →Svisa Eo-Societo

## SVISA ESPERANTO-SOCIETO (SES)

**Fondo en 1903:** Ĉar S. naskiĝis kaj ekevoluis en Romandio, tial ne estas hazarde, ke kiel ĝia unua prezidanto S. povis estis gajnita →*Eugène Failletaz* (1873-1943) el Laŭzano, grava romanda pioniro en industri-komercaj medioj en la vaŭda kanton. Kiel S.-vicprezidantoj oficis A. Hug el Friburgo kaj →*Jean Borel* (1868-1946) el Vaumarcus/NE; sekretario kaj redaktoro fariĝis Théodore Renard el Ĝenevo, kiel kasisto ekoficis Joseph Feierabend (+1947) el Berno. En la fondkunveno de S., tiam nomata Svisa Esperanta Societo, kiu okazis la 27an de septembro en Rolle/VD en la hotelo Tête Noire (Nigra Kapo), ĉeestis krom reprezentanto de la ĝeneva kanton (s-ro Thiébaud) ankaŭ Théophile Cart (1855-1931), konata Eo-aganto el Francio, dum la ĝeneva filozofa →*Ernest Naville* (1816-1909), unu el la plej fruaj kaj sinceraj aprobantoj de Eo, pro malbona sanstato estis malhelpata persone ĉeesti. Sed la invitito mesaĝis certigon al la kunsidantoj, ke li apogas la Eo-aferon. Pro tio S. atribuis al li la unuan honoran prezidantecon. La raporto pri la fonda kunsido aperis en *Svisa Espero* (SE), oktobro 1903. La unuaj eldonoj de tiu bulteno, kiu ekaperis en februaro 1903, estis manskribitaj kaj multobligitaj laŭ la tiamaj ebloj, rimedoj kaj gusto. La kovrilpaĝo prezentis alpan pejzaĝon, kie brilegas granda kvinpinta stelo; preskaŭ ĉiuj tekstoj estis dulingvaj (esperante kaj france) por atingi ankaŭ la komencantojn.

La financa raporto de S. montris, ke la eldono de la revuo SE reprezentis la ĉefan elspezon de la juna societo. S. rikoltis en la jaro 1903-4 148 kotizojn en Svislando kaj 49 kotizojn eksterlande. La kotizo, kiu inkluzivis la abonon al SE, en 1903 estis du kaj en 1917 tri svisaj frankoj.

La demisio de Failletaz en 1904, kiu rezignis pro troa laborŝarĝo sur aliaj kampoj, evidente estis forte bedaŭrata de la S.-anoj; la oficon de la prezidanto dume transprenis Joseph Feierabend antaŭ ol oni elektis kiel novan prezidanton de S. →*Friedrich Schneeberger* (1875-1926), internacie konatan kaj tre vervan Eo-aktivulon. Li restis prezidanto ĝis 1908, kiam la Ido-krizo absorbis lin. (→Ido en Svislando). La dua ĝenerala jarkunveno de S. en 1904 disvolviĝis en Coppet/VD. Ĉifoje Naville povis partopreni la kunvenon, kie li, laŭ rakonto de →Edmond Privat, laŭlegis la festenan menukarton en Eo.




Hotelo Nigra Kapo en Rolle/VD



Failletaz, Renard, Feierabend (1909)



Dum la tria jarkunveno de S., kiu estis samtempe la unua Eo-renkontiĝo en germanlingva Svislando, en septembro 1905 en Lucerno, la membroj aprobis la deklaron pri esperantismo, kiu estis akceptita de la bulonja kongreso en 1905, kaj invitis la duan universalan kongreson al Ĝenevo. Ĉi tiu UK sukcese disvolviĝis en la kalvina urbo en somero 1906 kaj donis al la junaj e-istoj → Hector Hodler (1887-1920) kaj → Edmond Privat (1889-1962) la okazon prezenti sin antaŭ pli granda publiko. (→ Universalaj Kongresoj de Eo)



Raporto pri la unua kunveno de SES en 1903

Pro la ĝeneva UK ekinteresiĝis pri Eo ankaŭ → René de Saussure (1868-1943), ano de signifa ĝeneva familio kaj frato de la fama lingvisto Ferdinand de Saussure (1857-1913). Post la foriro de Schneeberger al Ido en 1908, de Saussure pretis ne nur transpreni la prezidan funkcion en S., sed li ankaŭ redaktis kaj produktadis la revuon *Svisa Espero* (1909-10

kaj 1916-18), evidente je propraj kostoj. Kiam li sentis, ke oni pli kaj pli suspektas lin kiel lingvo-reformemulon (projekto Antido), kaj ke li ne plu posedas la centprocentan fidon necesan por esti prezidanto de S., li proponis en 1911 sian demision, avertante, ke li neniel volis malhelpi la zamenhofan aferon kaj ke oni miskomprenis liajn intencojn koncerne la esencon de lia scienca analizado de Eo. La prezidanta torĉo estis transdonita al → Eduard Stettler (1880-1940), grava funkciulo de UEA, organizo fondita en 1908 en Ĝenevo. Kvankam de Saussure fariĝis kaj restis eterna kaj iom konfuza planlingvoeksperimentulo, li tamen neniam perdis sian simpatian por la e-istoj, finfine li estis honora membro de S.



Schneeberger, de Saussure, Stettler



Jakob Schmid, Jules Perlet kaj Jean Wenger

Stettler oficis du jarojn, dumilite sekvis lin provizore → Jakob Schmid (1869-1955). Por solvi la prezidan krizon en 1915 provizore revenis René de Saussure al la pinto de S. (ĝis 1917) por gvidi la societeton kun la asisto de → Jules Perlet (1887-1964), kiu rolis kiel ĝenerala sekretario. Ilia ĉefa tasko estis revigligi la asocion, kiu montris simptomojn de dormo. En Berno, kie de Saussure kaj Perlet loĝis, malfermiĝis eta centra oficejo de S. (1916). En la CK de S. sidis ankaŭ → Jean Wenger (1881-1960) el Neuchâtel, SE-

redaktoro Théodore Renard, →Hans Kürsteiner (1885-1968) kaj →Jules Wolf (1887-1944), fondintoj de la lokaj EG en St. Gallen kaj La Chaux-de-Fonds.

Al la kuraĝo kaj kapablo de de Saussure, Jakob Schmid, Jules Perlet, Eduard Stettler kaj aliaj oni dankas ankaŭ la preparadon kaj realigon de la 9a UK, do de la tria internacia kongreso okazinta en Svislando en 1913 en Berno. (→Universalaj Kongresoj de Eo)



SES-tago en Laŭzano, 1909

Inter majo 1912 kaj julio 1914 *SE* aperis komune kun aŭ kiel integra parto de *Monda Poŝto / Weltpost*, gazeto kiu en 1909 iĝis la oficiala organo de Internacia Ligo (Monda Ligo). Ĉi tiu profesi-aspekta periodaĵo, redaktata de *Jean Thalmann* en Fischenthal/ZH, estis liverata kune kun *SE* al la membroj de S. Pro la militeksplodo la planita UK en Parizo ne povis okazi, kaj la svisaj e-istoj devis atendi tutan semajnon ĝis ili povis reveturi al Svislando, kiel raportis *SE* 7/1915. *SE* 6/1914 estis la lasta antaŭ la milito. Nur ok monatojn poste aperis la sekva eldono. Dum 1918 la ligilo ne ekzistis, nur en 1919 ĝi estis reeldonita je propra risko de →*Karl Jost* (1876-1952) en Zuriko, kiu celis savi ĝin kaj la svisan movadon. Kiam en 1920 oni konstatis, ke nur malmultaj samideanoj pagas la abonon por *SE* kaj ke ĝi kaŭzas seriozan deficiton, Jakob proponis trovi solvon kun UEA. La redakcio de *Esperanto* fakte konsentis publikigi senpage la oficialajn informojn de S. *SE* 11-12/1920 ankoraŭ presis la deklaron pri homaranismo de L.L. Zamenhof kaj poste ĝis 1931 ne plu aperis kiel aparta organo de S. Tial eble iom mankas pli detalaj sciigoj pri la agado de S. en tiu periodo.

Inter 1919 kaj 1921 disponigis sin por la prezido de S. →*Jean Wenger* (1881-1960) el

Neuchâtel. Laŭ *SE* majo 1960 Wenger, kiu estis membro de la Lingva Komitato kaj de la Akademio de Eo, fervore disvastigis Eon precipe en la jaroj antaŭ la unua mondmilito.

**Periodo Privat:** Pli daŭran stabilecon de la prezida funkcio garantiis por S. dum la 20aj jaroj →*Edmond Privat* (1889-1962). Pro Privat, kiu fariĝis ne nur elstara e-isto, sed kiu estis agnoskita kiel eminenta personeco ankaŭ ekster la Eo-movado, la ĝenevaj kaj svisaj Eo-organizoj ricevis multajn novajn impulsojn. En 1923-28 Privat oficis ankaŭ kiel prezidanto de la Internacia Centra Komitato, kaj en 1925 kiel prezidanto de UEA mem. Krome li estis la redaktoro de la revuo *Esperanto* de UEA. En 1927 S. elektis lin honora membro.



Edmond Privat diversage

En 1922 S. nombris 254 membrojn (antaŭe 196), en 1926 ĝia membronombro altiĝis al 464. Kiel prezidanto post Privat sekvis denove Eduard Stettler, kiu estis simile kiel Privat nedisigeble ligita kun la konstruado de UEA en Ĝenevo. Kiel sperta juristo Stettler verkis la novan statuton de S. (kaj de UEA). Tro frue li mortis sesdekjara en 1940. *EdEo* prijuĝis lin tre pozitive koncerne liajn personajn trajtojn, nome „konsekvenca en sia sinteno, prudente klarvida kaj precizega en detaloj” - kiel decas por serioza berna burĝo kaj kompetenta juristo! Gravan rolon Privat kaj Stettler ludis ankaŭ dum la 17a UK, kiu okazis en somero 1925 en Ĝenevo. (→Universalaj Kongresoj de Eo)



SES-kunveno en Berno, 1928

**1930aj jaroj:** La sekva prezidanto de S., →*Rudolf Gottlieb Maeder* (1900-40), estis konata kiel multjara prezidanto de la EK St. Gallen, ĉefgrupo de S. en tiu tempo, kie li enkondukis la kursojn de Andreo Cseh kaj de gesinjoroj Morariu kaj ofte mem prelegis. Maeder restis prezidanto ĝis 1937. Subite li forpasis en 1940 en la aĝo de 40 jaroj pro ekesto de embolio. Kiel sekretario de S. kunlaboris ankaŭ →*Eduard Spielmann* (1870-1938). Lia oficejo ĉe Gesellschaftsstrasse 39 en Berno, kiun li funkciigis ekde 1933 sub la nomo →*Svisa Eo-Instituto*, fariĝis eta centra oficejo de la svisa Eo-movado. Ĝi disvolvis nekutime vastan propagandan kaj informan aktivecon kaj kontribuis al la firma defendo de Eo kontraŭ aliaj planlingvaj rivaloj kiel Occidental kaj Ido, kiuj iom furoris tiutempe. Kadre de siaj agadoj Spielmann multe klopodis ankaŭ por la okazigo de la venonta UK en Svislando, kiu fakte efektiviĝis en 1939 en Berno. Kun lia morto en 1938 silentiĝis ankaŭ la instituto.



Jost, Maeder, Kürsteiner

En 1937 ĉe la pinto de S. alvenis *Georg Rotach* (1894-1988), sed li demisiis pro protesto kontraŭ la aliĝo de S. al IEL. Tiel unu jaron poste li estis sekvata de la neŭŝatelano →*William Perrenoud* (1898-1984), kiu ludis eĉ pli gravan rolon dum la 50aj jaroj.

La CK de S. en 1931/32 estis formita de Stettler, Spielmann, Schmid kaj A. Vonlanthen, ĉiuj el Berno. Eo-ekzamenoj estis organizataj kadre de la jarkunvenoj de S.

La movada disdubiĝo, t.e. la duopo UEA-IEL en la 1930aj jaroj, ja ne rekte koncernis la svisan landan asocion, ĉar ĝi estis interna afero de →UEA. Tamen tiuj ekscitaj eventoj postlasis spurojn ĉe la ĉagrenitaj S.-anoj, ĉar UEA formis parton de la svisa Eo-historio kaj ĉar ĝia centra oficejo, gvidata de →Hans Jakob, troviĝis en Ĝenevo. En la jarkunveno de S. en aprilo 1936 Karl Max Liniger, delegito de UEA, raportis kun ĉagreno pri la plano de UEA translokigi la sidejon, oficejon kaj bibliotekon de UEA al eksterlando. S.-prezidanto Maeder rekomendis al la membroj subteni deklaron kontraŭ tiu decido kaj skribi oficialan protestleteron al Bastien, prezidanto de UEA, kiu postulas, ke okazu voĉdonado pri la decidoj de UEA inter ĉiuj membroj de UEA. La koncerna letero, kiun subskribis Maeder kaj Kürsteiner, estis publikigita en *SE* 3/1936. La propono de Eduard Spielmann, ke UEA estu transformita en Universalan Pacunion, ne trovis la apogon de S. Post kiam 80 procentoj de la UEA-delegitoj aprobis la estraran planon, kaj post kiam fiaskis repacigaj traktadoj dum la UK en Vieno en 1936, la 18an de septembro 1936 Bastien anoncis la fondon de *Internacia Eo-Ligo (IEL)* kun sidejo en Britio.




SES-tago en Zuriko, 1936



SES-tago en Aarau, 1937

Post kiam la plimulto de la landaj asocioj kaj grandega plimulto de la individua membraro aliĝis al IEL, en la jarkunveno de S. en 1937 la reprezentantoj de la zurika ES proponis, ke ankaŭ S. aliĝu al la nova organizo. Tamen la S.-membraro decidis ankoraŭ ne aliĝi al IEL (*SE* 3/1937). La momento por tio venis nur unu jaron poste. Laŭ la subskriblisto la jarkunvenon de S. en Biel-Bienne en 1938 ĉeestis entute 92 personoj. Kun la aldono de la voĉoj el Aarau kaj Herisau estis rikoltitaj 78 individuaj voĉoj por la aliĝo de S. al IEL kaj 79 kontraŭ ĝi. Tamen la aliĝo estis decidita afero, ĉar la grupaj voĉoj formis la decidan bazon laŭ la statuto (*SE* 2/1938). Tiel S. decidis fariĝi landa asocio de IEL kaj adaptis sian statuton al la novaj cirkonstancoj. Post tiu rimarkinda paŝo la svisaj e-istoj povis transpreni la organizadon de la venonta 31a UK en 1939. (→Universalaj Kongresoj de Eo)

**Dummilita periodo:** 1939-42 S. estis prezidata de →*Marcel Jaccard* (1902-73). En 1938 Jaccard ankoraŭ rifuzis reelekton en la CK de S., ĉar li malkonsentis pri la aliĝo de S. al IEL kaj eĉ sugestis likvidi la asocion, se ĝi ne kapablos trovi taŭgan prezidanton. Dum sia prezida periodo Jaccard gvidis la ekzamenan komitaton kaj redaktis la organon *SE*, en kiu aperis liaj modele kaj vizie verkitaj artikoloj pri la aktuala situacio de la mondo, kiu estis skuata de la dua mondmilito. Jaccard lamentis pri la aktuala civiliza malordo kaj postulis, ke la mondo devus esti rekonstruata sur nova paca fundamento (*SE* 2/1939). Samtempe li atentigis pri la meritoj de la e-istoj, kiuj laŭ li kapablas praktiki solidarecon kaj interpopolan interkomprenon. La duigitan Eo-movadon Jaccard alvokis al unueco kaj fideleco.



Jaccard, Gilliard, Unger

*Pensoj de Zamenhof* (1945) estis la titolo de broŝuro, kiu prezentis la homaranismajn ideojn de la majstro kaj kiu estis kompilita de →*Alfred Bader* (1889-1968) en Eo, la franca, germana, itala kaj angla lingvoj kaj eldonita de S. ĝustatempe je la delonge sopirata fino de la mondmilito. Poste S. eldonis ankaŭ la de Bader tradukitajn librojn *Ĉe la sanktaj akvoj* de J.C. Heer kaj *Du amosentaj noveloj*, entenanta *Imenlago* de Theodor Storm kaj *Maruška* de Mela Escherich (1947).




SES-tago en Langenthal, 1941

La dummilitaj jarkunvenoj de S. okazis en Berno (1940), Langenthal (1941), La Neuveville/BE (1942), Locarno/TI (1943), Herenstein/LU (1944) kaj Montreux/VD (1945), sub la gvido de la S.-prezidantoj Marcel Jaccard (1939-42), poste Otto Walder (1942-45). Aliaj estraranoj nomiĝis Arthur Baur, Lena Grütter-Häberli, Lilly Schaerer, Martin Ardüser, Walter Fauser, Walter Streun kaj Jules Gilliard.

En tiu periodo estis organizitaj ankaŭ pluraj regionaj kunvenoj en Morges/VD, Biel-Bienne, Zürich kaj St. Gallen (1942), Laŭzano, Zuriko, Bad Attisholz/SO, Rorschach, (1943), Chexbres/VD, denove Zuriko, La

Neuveville/BE, (1944), Dietikon, Ĝenevo, Friburgo, Amriswil (1945). EG funkciis en Bazelo (J. Buchmann), Berno (M. Ardüser), Biel-Bienne (N. Voirol), La Chaux-de-Fonds (R. Zollinger), Ĝenevo (René Petitpierre), Herisau (Emil Zuberbühler), Morges (Ch. Jayet), Neuchâtel (W. Perrenoud), Soloturno (F. Ryser kaj K. Amman), St. Gallen (H. Kürsteiner), Thun (O. Huber) kaj Zuriko (L. Riedli). Plue oni legis en *SE* 5/42, ke Franz Ryspi (1903-1972) propagandis la lingvon en Amriswil/TG kaj ke Fauser intencis starigi EG en Chur/GR.



Bader, Walder kaj Ardüser

En sia jarkunveno de 1940 laŭ propono de Walder, S. decidis enkonduki la sistemon de konsilantoj, kies tasko estis reprezenti en siaj organizoj la centran komitaton de S. kaj regule raportoj pri sia agado en la CK. Nova statuto, ellaborita de William Perrenoud, validis ekde januaro 1941. Okaze de la jarkunveno en La Neuveville en 1942 Edmond Privat prelegis pri la federalismo en Svislando, Usono kaj →Ligo de Nacioj (lia ĉi-tema libro aperis en 1958; →Antologio). Privat estis ankaŭ la ĉefa organizanto de la Svisa Eo-Tago en Ascona kaj Locarno en Tiĉino (1943) kaj la ĉefpreleganto de la unua postmilita kongreso en Montreux en 1945. Lia kolego →Pierre Bovet (1878-1965) el Ĝenevo prelegis dum la Svisa Eo-Kongreso en Hertenstein/LU en la sama jaro.

Daŭre funkciadis la Interhelpa Servo de UEA kaj S. (en kunlaboro kun la Ruĝa Kruco) por mildigi la sorton de internigitaj e-istoj en militkaptitejoj en Francio kaj aliaj landoj. Kun la helpo de Sveda Eo-Federacio S. komencis eldoni perkorespondajn kursojn, kaj kune kun UEA oni aperigis *Eo-slosilojn* por germanoj. Kun la celo intensigi la Eo-propagandon estis lanĉita la „idea konkurso“ en 1942 kaj vendi-

taj 200 propagandaj numeroj de *SE*. Vicprezidanto *Martin Ardüser* (1917-43) reprezentis S. en la mondlingva komitato de Eŭropa Unio. En 1943 la laboristaj e-istoj malakceptis kunfandiĝon kun S., laŭ sugesto de Kürsteiner. En la sama jaro, dank' al la profesia ĵurnalisto →*Hans-Joachim Unger* (1894-1984) reaperis la gazetara servo de S., kies publikaĵoj disendiĝis al la gazetaro, politikistoj, sciencistoj kaj industriaj medioj. Dum la milita periodo mortis krom Rudolf Maeder kaj Eduard Stettler (en 1940) ankaŭ →*Georges Stroele*, →*René de Saussure* kaj *Martin Ardüser* (ĉiuj tri samjare en 1943) – kio signifis grandan perdon por la tiama generacio de e-istoj.

1945-47 oficiis kiel prezidanto de S. →*Jules Gilliard* (1901-62), kaj en 1947-50 S. estis prezidata de →*Fritz Liechti* (1913-2001).



SES-tago en Berno, 1940 (sub la parlamentejo)

**Postmilitaj kaj 1950aj jaroj:** Pro la bonaj rilatoj kun IEL kaj UEA samtempe S. povis organizi la unuan postmilitan UK en Berno en 1947. (→Universalaj Kongresoj de Eo)

De 1951 ĝis 1962, →*Arthur Baur* (\*1915), profesia ĵurnalisto (redaktoro de *Neue Berner Zeitung*), modele redaktis *Svisan Esperon*, lukse kompostatan kaj presatan ĝis 1958 en Nederlando, kunlabore kun la nederlandaj kaj belgaj samideanoj. En 1953, sub la aŭspicio de S., Eo-ekspozicio estis aranĝita en la Svisa Nacia Biblioteko en Berno. La 2an de junio 1954 S. povis organizi en Berno aŭdiencon ĉe la prezidanto de la svisa federacia ministro Max Petitpierre (1899-1994). La S.-delegacio ĉefe atentigis pri la graveco de la alprenota Unesko-rezolucio. Krome en 1954 S. povis

ekaranĝi ankaŭ internaciajn feriajn kursojn en la →Kastelo Münchenwiler apud Murten. Ĉi tiu ejo estis uzata de la berna kantono por la klerigo de ĝiaj civitanoj. En la kastelo somere efektiviĝis la prelegoj de →William Perrenoud pri →geonismo kaj lingvoinstruado laŭ →La ora metodo. Samtempe okazis lingvaj ekzamenoj de S. kun disdono de diplomoj (atesto pri lernado kaj supera diplomo). La pli kaj pli fanatika geonisma sinteno de Perrenoud kaŭzis malkreskon de la kursanaro, kaj la morto de Hanni Fischer en oktobro 1961 kondukis al la praktika fino de la kursoj en Kastelo Münchenwiler.

En 1951 ekfunkciis la *Junular-Sekcio de S.*, kiel reago al la progresanta maljuniĝo de la pionirgeneracia aktivularo, kiel oni pravigis ĝian fondon. La sekcio estis ekgvidata de →Bruno Graf (\*1928), kiun sekvis →Hans Herrmann (1926-2002), →Max Abegg (\*1937), kiu 1954-59 estis diplomita kursgvidanto kaj komitatano de la CK de S., kaj →Claude Gacond (\*1931). Kun la celo praktike uzadi Eon, ĉi tiuj aktivuloj organizis skiferiaden en Adelboden; ĉi tiu grava aranĝo okazis 21 fojojn ĝis 1978.



Laederach, Liechti kaj Graf

Malgraŭ tiuj evidentaj sukcesoj la responsulo Graf montris sin malkontenta pri la aktuala stato de la svisa Eo-movado. Graf kulpigis la eksmodan stilon de la Eo-propagando kaj lamentis pri la intelekta izoleco de la svisaj e-istoj kaŭzita de la malkreskado de tiu movado. Kritikante ankaŭ la validan organizan strukturon, Graf pledis por tio, ke la e-istoj prefere eniru ĉiujn internaciajn forumojn por demonstri al la homoj kiun rolon Eo povus ludi en la praktika vivo sub la kondiĉoj de kreskanta internaciismo kaj universalismo. Emfazante la gravecon de la gazetara servo

*Eo-Information*, modele pretigita de Arthur Baur, Graf sugestis la kreon de nacilingva informservo por la amikoj de Eo.



Herrmann, Perrenoud, Gacond



SES-tago en Berno, 1954 (sub la parlamentejo)

La groteska kulmino de tiu „spirita“ krizo, kiun akriĝis i.a. la rigideco de la asocia statuto, estis atingita en la ĝenerala kunveno de S. en 1957, kiam la kunvenantoj devis trovi novan prezidanton. 1950-53 rolis kiel S.-prezidanto →Werner Laederach (1912-2002), 1953-54 →Hans Herrmann (1926-2002), kiun sekvis →William Perrenoud (1898-1984). La statuto ne permesis la reelekton de la malnova prezidanto post ties unua trijara oficperiodo. Sen altrudi sin la demisianta prezidanto Perrenoud anoncis sian principan pretecon esti reelektita, se la membroj konsentas pri la koncerna statutŝanĝo proponita de René Zollinger. Otto Walder, estro de la S.-libroservo, estis jam cirkulere prezentinta siajn argumentojn kontraŭ la statutŝanĝo, kaj post tre vigla diskutado, en kiu partoprenis dudeko da personoj, oni efektive voĉdonis plimulte kontraŭ la statutŝanĝo. La problemo estis nur duone solvita, ĉar freŝaj kandidatoj por la prezido ne


estis je dispono. Pluraj proponitaj kandidatoj rifuzis esti elektitaj, tiel ke oni ripetis la voĉdonon pri la sama statutŝanĝo, sed la rezulto restis principe la sama kiel antaŭe, t.e. la statutŝanĝo restis malakceptita. Pri la sekvo *SE* 2/1957 raportis jene: „La serĉado de prezidanto rekomenciĝis kaj fine →Hans Hunkeleler savis la situacion. Li admonis, ke ni vivas en la epoko de la samrajteco de la virinoj kaj sugestis, ke S. facile povus elekti virinon kiel prezidanton. Li proponis fraŭlinon →*Lilly Schaerer* (1905-2001) el Langenthal/BE kiel kandidaton por la prezido. Ŝi estis tre surprizita kaj unue ne volis akcepti la oficon, sed fine ŝi cedis al la persvadoj kaj akceptis esti prezidantino de S. dum unu jaro.” Ekde tiu tago Lilly Schaerer apartenis entute tridek jarojn al la CK de S., jen kiel prezidantino (1957-60), jen kiel sekretario, kaskontrolantino kaj kasistino (1960-88), disponigante dum tiu periodo sian privatan adreson al S. kiel ĝian asocian adreson (Schorenstrasse 32, 4900 Langenthal).



Lilly Schaerer

En 1957 Lilly Schaerer anoncis en sia jarraporto, ke la ĵus pasinta jaro „eniras la historion kiel trankvila jaro por S. Mankis festoj, mankis granda agado, tamen interne la socio ĝojige plifirmiĝis“. Diversaj problemoj lige kun la eldono de *SE*, precipe la retiriĝo de la nederlanda partnero, devigis S. reekzameni la komunan projekton. Fine oni decidis retranspreni la informilon plene al Svislando, presigi ĝin en Berno kaj redukti ĝian amplekson. Grandan parton de sia tempo S. investis en la modifon de la statuto, kies nova teksto aperis en *SE* 2/58.

**1960aj jaroj:** La Eo-tagoj en Berno en 1962 estis dediĉitaj al →Edmond Privat, kiu forpasis en tiu jaro same kiel →Jules Gilliard pro trafikakcidento en Vaŭdo kaj →*Charles Ecabert* (1913-1962) pro alia akcidento. La ĉilasta neŝatela instruisto e-istiĝis promesplesne antaŭ nelonge, transprenis en 1962 la redaktadon de *SE* post la demisio de Arthur Baur kaj komencis ankaŭ radioprelegi en Eo ĉe Svisa Radio Internacia (SRI). Pli granda manifestacio omaĝe al Privat kaj Ecabert okazis en novembro 1963 en la aŭditorio de la neŝatela universitato.



Ecabert, Baur, Piron

Nova *SE*-redaktoro fariĝis →*Claude Piron* (\*1931), ĝis 1966. Lin sekvis en tiu funkcio pastro *Wilhelm Flammer* (1909-77). Kiel prezidanto de S. oficis →*Bruno Graf* (\*1928), sub kiu la asocio en 1962 pro neŭtralecaj konsideroj ekŝiĝis el la Svisa Packonsilio, al kiu S. aliĝis laŭ sugesto de Privat. Postaj prezidantoj fariĝis →*David Buhlmann* (\*1933) kaj →*Werner Laederach* (1966-71).



Buhlmann, Laederach, Flammer

Unu el la intencoj de la starigo de →*Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI)* kadre de la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds en 1967 estis servi kiel dokumenta centro ankaŭ al S. Komence

S. kritikis la planlingvan neŭtralecon de CDELI. La konstruado de →*Kultura Centro Esperantista (KCE)* kaj de ties *Internacia Feria Alternejo (IFA)* en La Chaux-de-Fonds ekde 1968 celis i.a. la kulturen pliklerigon de la S.-anoj. Dum tiuj ideoj ja trovis vastan aprobon precipe ĉe romandaj e-istoj, multaj alemanaj samideanoj en S. restis skeptikaj pri la kuraĝa Eo-eksperimento en la por ili iom fora Neŭŝatela Ĵuraso. Tiuj antaŭjuĝoj kaj aliaj cirkonstancoj kaŭzis ne ĉiam harmoniajn rilatojn inter KCE kaj S. Tiel la tradicio de la regionaj kunvenoj kadre de S. estis daŭrigata en formo de kulturaj semajnfinoj. De 1969 →*Claude Gacond*, sekretario (poste direktoro) de KCE, kunlaboris ankaŭ kiel redaktoro de *SE* kaj tiel klopodis faciligi la ligan inter KCE kaj S. Kvankam modeste produktita, la revueto enhavis ĉiujn gravajn anoncojn kaj raportojn pri la diversspecaj Eo-aranĝoj en Svislando, eĉ pri kongreso de SAT-Amikaro en 1973 en Laŭzano. Ĝi ofertis al la S.-anoj interesan program-elekteblon, kiu bedaŭrinde ne ĉiam estis sufiĉe eluzata de la Eo-komunumanoj. Inter la lokaj EG mankis firma ligo, iliaj membroj restis enfermitaj kaj vidis unu la aliajn precipe dum la ĝeneralaj kunvenoj de S. kaj eble ankaŭ dum regionaj kunvenoj.

**1970aj jaroj:** Komence de ĉi tiu jardeko, kiel prezidantoj oficis *Karl-Heinz Mischler* (1971-72) el Zuriko kaj →*Daniel R. Muhlemann* (1972-73) el Argovio. Ĝojiga novaĵo de la jaro 1972 estis la restarigo de la ekzamena komitato en kunlaboro inter S. kaj KCE kaj la okazigo de provekzamenoj dum la S.-tagoj en Gwatt en 1973 sub la gvido de →*Henri Vatré* (1908-98). Nature kelkaj e-istoj kiel Mirko Mamužić, (→*Emmerich Manner*) konsciis, ke la posedo de Eo-diplomo ne helpas gajni monon aŭ atingi pli altan socian pozicion, kiel tion ofte ebligas la kono de naciaj lingvoj. La bona etoso de la Gwatt-a S.-jarkunveno, kiu estis prezidata de William Perrenoud, estis refoje minacata de burokrateca kverelo. En *SE* (aprilo 1973) eblis legi, ke la gvidado de la kunveno de William Perrenoud kiel taga prezidanto ja estis aprobita. Sed jam ĝia starto estis malfeliĉa kaj kondukis al tumulto, ĉar oni timis, ke Perrenoud enmiksiĝos en la debatojn kun personaj ko-

mentoj. Tial estis trovita la kompromiso, ke la elektita tagprezidanto gvidu la kunvenon nur teknike, sen preni vidpunktojn. Krome oni perdis multe da tempo pro la diskuto pri la t.n. deklaro kaj propono de la CK rilate al fonduso por sekurigo de S. Estis raportite, ke temis pri provo elimini Otto Walder el la CK. Krom senfinaj kontraŭdiraj diskutoj aldoniĝis du voĉdon-proceduroj, kiuj ne alportis kontentigan rezulton. La kunveno daŭris ĝis en la malfruan nokton. Fine nur 5 el 15 traktaĵoj povis esti plenumitaj. Per statistika prezentaĵo →*Kurt Greutert* (\*1927), uzante ciferojn el raportoj de la CK mem, klopodis pruvi, ke S. „de du-tri jaroj ne povas esti sur la ĝusta vojo.“ Kaj tiel plu. Perrenoud pretis plugvidi la kunvenon kun la asisto de la nove elektita prezidanto Otto Walder kaj kun la estraranoj Lilly Schaerer kaj Kurt Greutert nome de la „opozicia“ elektolisto, kiu venkis kontraŭ la stabo de prezidinto →*Daniel R. Muhlemann* kun →*Maŭrico De Sassi* kaj William Perrenoud kiel proponitaj estraranoj. Unuafoje kaj unike en la historio de S., du konkurantaj kandidato-grupoj do luktis por esti elektitaj! Ĉi tiu iom groteska epizodo ilustras, ke la problemo trovi taŭgan prezidanton akompanis la asocion fakte dum ĝia tuta historio.



Karl-Heinz Mischler


*Svisa Esperanto-Revuo (SER)* estis la nova titolo de *Svisa Espero*, kiun ĝi alprenis post ideokonkurso kaj skriba voĉdono; samtempe ĝi reduktis sian eldonkvanton de 800 al 600 ekzempleroj.

Fine de novembro 1976 ree eksplodis en S. eta krizo pro la demisio de la prezidanto kaj la nekapablo trovi novan estron. La ĉijare elektita prezidanto →*David Buhlmann* dis-



sendis cirkuleron al elektita parto de la S.-anaro, per kiu li anoncis sian rezignon. Laŭ propra klarigo la kaŭzo de la demisio de Buhlmann estis liaj vanaj klopodoj plibonigi la kontaktojn inter S., KCE kaj la endormiĝinta junulara grupo, kiu estis restarigita sub la nomo *Svisa Eo-Junularo (SEJ)* komence de la 70aj jaroj sub la gvido de →*Andres Bickel* (\*1954), *François Mottet* kaj *Marie-Louise Münger* (\*1945). Kulpokaproj estis serĉataj, reciprokaj riproĉoj esprimitaj, eĉ publike tra *SER*. Al la CK de S. restis neniu alia elekto ol renomi la malnovan prezidanton Otto Walder kiel estron de la asocio. Jam unufoje Buhlmann kaŭzis gvidokrizon meze de la 60aj jaroj, kiam li same subite demisiis pro privata translokiĝo. La prezidanta problemo do daŭre ne trovis kontentigan solvon kaj bizare reaktualiĝis dum la jarkunveno de S. en 1977, kiam Andres Bickel kiel reprezentanto de la juna generacio disponiĝis kiel oficiala kandidato por la prezido. Liaj kondiĉoj kunelekti du proksimajn kolegojn al la CK, inter ili →*Olivier Tzaut* (\*1935), kiu tiucele ĵus pagis la kotizon kiel nova membro de S., ne estis akcepteblaj por la reganta S.-estraro. Pro tio la projekto fiaskis kaj la maljunuloj plutiris la tremantan kaj por la junularo malallogan ŝipon.


Por plibonigi la rilatojn inter S. kaj KCE en 1978 prezidanto Walder duan fojon vizitis La Chaux-de-Fonds. Kiel rezulton de tiu vizito Walder diagnozis „bonvolon al kunlaboro, tamen ĉiu agu sur sia kampo, sed kun interkonsentoj kie neceso“ (*SER* 3/1978). Malgraŭ tiu pozitiva konkludo la S.-membroj dum sia jubilea jarkunveno en Baden/AG okaze de la 75-jariĝo de S., partoprenata de 80 personoj, malakceptis la proponon de du membroj (Weigelt kaj Ringli) apogi KCEn per monsumo kiel signo de kunlaboro. Finfine oni tamen aprobis la ideon donaci sumon, sed al CDELI. Alia propono pri stipendio favore al iu studento por labori ĉe CDELI post sufiĉe akra diskutado kaj obstinega defendo estis konsiderata nematura kaj prokrastita. Walder interpretis la rilatojn inter S. kaj KCE kvazaŭ kiel generacian konflikton kaj defendis la sintenon de S., kiu ofte klopodis per sincera diskutado trovi bonan solvon de la komunaj problemoj.



Gacond, Greutert, Walder

En Rolle/VD, kie S. estis fondita antaŭ 75 jaroj, en septembro 1978 okazis memorkunveno en la hotelo Tête Noire. Ĉi-rilataj historiaj dokumentoj el la unuaj numeroj de *SE* estis represitaj en *SER*, kies grafikon prizorgis S.-vicprezidanto *István Mórocz* (\*1935). Kiel profesia grafikisto kun propra grafika entrepreno kaj -eldonejo kun la nomo Eo-Mondo en Zuriko, Mórocz ellaboris ankaŭ la siglon de IFA de KCE kaj kreis la grafikan koncepton por la montropaneloj de nova ekspozicio pri Eo kaj interlingvistiko en la Svisa Nacia Biblioteko en Berno, aranĝita de CDELI en 1979. En tiu jaro Mórocz estis prezidanto de S. kaj redaktis ankaŭ unu kajeron de *SER*.

*SER* 1/75 raportis, ke S. ricevis la proponon de UEA transpreni la organizadon de la venonta UK, aŭ almenaŭ de ia internacia konferenco, por la proksimaj jaroj. La ĝenerala kunveno de S. en 1976 reagis pozitive kaj voĉdonis jese por la UK-invito propono el Roterdamo kaj donis al la provizora LKK, konsistanta el Werner Laederach, Kurt Greutert, Lilly Schaerer, Ernst Glättli, Johann Lutz, Erna Döring, Heinrich Ringli, Gertrud Weigelt, François Mottet, Arthur Baur k.a. verdan lumon por la preparado de la universala kongreso. Komence de 1977 la estraro de UEA konfirmis la okazigon de la 64a UK en la centrasvisa urbo Lucerno. Do 32 jarojn post la lasta berna UK en 1979 denove okazis Eo-mondkongreso en Svislando. (→Universala Kongresoj de Eo)



Muhlemann, Weidmann, Tzaut

**1980aj jaroj:** La ĵurnalisto kaj e-isto → Arthur Baur (\*1915), kiu gvidis la gazetaran servon dum la lucerna UK, pretis en 1980 laŭ insista peto de diversaj flankoj akcepti la prezidon de S. Kun Baur S. finfine trovis prezidanton, kiu posedis longan sperton pri Eo kaj kiu montris multe pli malstreĉitan sintenon vidalvide de la institucioj en Ĉaŭdefono ol Otto Walder kaj Kurt Greutert faris tion. Baur regule admonis en siaj raportoj pri la neceso de la kunlaboro inter la Eo-organizoj en Svislando. *SER* riĉiĝis per legindaj artikoloj kaj lasis spacon ankaŭ al la Eo-junularo, kiu reorganiziĝis sub la titolo *Junularo E-ista Svislando (JES)* kun la gvido de → *Dietrich Weidmann* (\*1960). La flava inform-flugfolio *Esperanto heute*, redaktita de Baur, estis dissendita kun *SER* en septembro 1980, kaj la longa artikolo *Von der Utopie zur Wirklichkeit - Geschichte der Plansprachen*, kiu same estis verkita de Baur kaj kiu aperis en la vintertura ĵurnalo *Der Landbote* (en 1976) kaj en aparta broŝureto, estis aldonita al *SER* en januaro 1985.

Dum la 80aj jaroj kelkaj S.-anoj, ekipitaj per verdstelaj ĉemizoj, partoprenis la tradician popolmarŝon, kiu estis ĉiujare organizita en la berna regiono dum du tagoj. Alispecan klopodon grandkvante atingi la publikon kaj informi ĝin pri Eo S. havis en 1981, presigante kaj distribuante precipe en restoracioj centmil telersubmetaĵojn el papero, kiuj enhavis klarigojn pri la Eo-movado.

En la jarkunveno de 1983 Kurt Greutert provokis novan esence burokratian diskuton per la postulo, ke S. ne plu pagu la kotizon al UEA por la asociaj membroj ĝis la kalkulo pri la lucerna UK estos finita. En tio li eĉ ricevis fortan subtenon de la S.-anoj, kiuj per tio malaprobis la prokraston flanke de UEA

kaj komisiis la CK de S. interveni en Roterdamo. UEA baldaŭ plenumis sian devon kaj la kvinjara disputado kun S. pri tio estis finita.

La lokaj EG atendis de la CK de S. instigojn, sed ankaŭ la CK atendis agadon de la lokaj EG. Ĉar la atendoj sur ambaŭ flankoj ne estis realaj, ia seniluziigo estis rimarkebla. Tamen 20 procentoj de la S.-membraro partoprenis la jarkunvenojn, kio evidente estas pli alta procentaĵo kompare kun la situacio en aliaj kulturaj asocioj en Svislando.

En la ĝenerala kunveno de S. en Bazelo en 1986 Arthur Baur transdonis la prezidan torĉon al → *Claude Gacond* (\*1931), kiu samtempe estis ankaŭ direktoro de KCE. Sub Gacond estis starigita detala laborplano, kiu antaŭvidis ankaŭ strukturajn reformojn en la CK, inkluzive de ĉi-rilataj statutŝanĝoj. Kun la celo stimuli la pli fruktodonan diskutadon kaj pli koheran kunlaboradon inter la diversaj lokaj kaj fakaj grupoj, splititaj laŭ regionisma kaj kantonisma spirito ne ĉiam produktiva, estis enkondukita t.n. larĝigita CK, kiu poste ricevis la nomon Federa Konsilio de S., al kiu aŭtomate apartenis la reprezentantoj de lokaj kaj fakaj EG kaj aliaj Eo-instalaĵoj en Svislando kun la rajto de po unu voĉo. La kerna CK, konsistanta el prezidanto, ĝenerala sekretario kaj kasisto, ricevis tri regionajn vicprezidantojn, kies tasko estis reprezenti la estraron de SES en la lingvoregionoj. Tiu nova CK estis plurfoje kunvokita, kaj trideko da aktivuloj de plej diversaj organizoj ĉeestis ĝin. Tiuj struktur-reformoj postulis pli altnivelan laborenergion kaj la fizikan ĉeeston de ĉiuj envolvitoj, kiu ne ĉiam estis plene garantiita, kaj ĝia energio komencis elĉerpiĝi en la lastaj jaroj de la prezido de Gacond.

Dume nova konflikto estis programita kun Kurt Greutert, kiu eksplicite rifuzis aparteni al tiu nova organo sub la gvido de Gacond kaj la ĝenerala sekretario → *Andreas Künzli* (\*1962), antaŭe komisiito pri junularo kaj la jubilea jaro. Ĉi-foje la kverelon provokis la t.n. fonduso 'Elkongresa Kapitalo', kiun Greutert administris kun → Ernst Glättli. Temis pri monsumo en alteco de pli ol 18'000 svisaj frankoj rezultintaj el la profito de la lucerna UK. La mono estis deponita en aparta bankkonto, kiu laŭ la opinio de Greutert kaj Glättli estis netuŝebla kaj utiligebla nur kun la

konsento de la administrantoj. Tiu elkongresa kapitalo, kiu fontis en la disdivido de la UK-profito laŭ la kongresa regularo kaj en la ekzistantaj valorpapiroj en alteco de fr. 15'000.-, formis kvazaŭ tabuon en la librote-nado de S. kaj kaŭzis embarasan situacion en la asocio. La nova CK, kiu trovis tiun staton absurda, deziris malbloki tiun sumon por investi ĝin en projektojn lige kun la jubilea jaro 1987. Dume la konflikto kun Greutert pro la elkongresa kapitalo kaj aliaj financaj, formalaj kaj statutaj demandoj ne estis solvita, sed eĉ pli akriĝis dum la ĝenerala kunveno de tiu jaro. La traktaĵo forte emociigis la S.-anojn, provokis la demisiemon de la novaj prezidanto kaj sekretario kaj fine kondukis eĉ al antaŭtribunala situacio. Daŭre timante, ke la koncernaj monsumoj eble povus migri al KCE/GEP, Greutert serĉis statut-formalan kaŭzon kiel pretekston por plendi ĉe la civila tribunalo kontraŭ S. La tribunala proceso finiĝis antaŭ la pacjuĝisto en Aarwangen/BE sen venko, nek por Greutert nek por S. Eksigita de la ĉagrenitaj membroj en la ĝenerala kunveno en 1988, la kverelemulo Greutert perdis ĉiujn funkciojn kaj honorajn titolojn kaj poste distanciĝis de la movado. La fonduso elkongresa kapitalo mem estis likvidita, transformita kiel rezerva kapitalo kaj reintegrata en la kalkulon de S.



Claude Gacond kaj Perla Ari-Martinelli

Malgraŭ tiuj ĝenoj S. festis la 100-jaran jubileon de Eo en 1987 per tri regionaj kulturaj semajnfinoj, per aktivecoj kun reprezentantoj de la amaskomunikiloj, i.a. gazetara konferenco en Berno en la ĉeesto de reprezentanto de SRI, kaj aliaj agadetoj.

**1990aj jaroj kaj ekde la jaro 2000:** Post la 'Greutert-krizo' aŭguriĝis nova peripetio: En printempo 1990 demisiis de sia posteno kiel redaktoro de *SER* →Andres Bickel, kiu de tri jaroj kun admirinda engaĝiĝo kaj plena kompetenteco prizorgis tiun revuon. Lia demisio do signifis samtempe la finon de tiu periodaĵo. Ĉar ne eblis trovi anstataŭanton por la redaktoro, la CK de S. decidis lanĉi internan societatan informilon kun la titolo →*Svisa Eo-Societo informas*. →Fritz Liechti (1913-2001) pretis prizorgi la redaktadon. Ĉi tiu solvo estis kombinita kun kontrakto kun la jure svisa Kooperativo de →Literatura Foiro, kiu jam en antaŭaj jaroj kunlaboris kun S., prezante ĝian organon. Laŭ tiu kontrakto la kultura revuo →*Literatura Foiro (LF)* estis distribuata inter la S.-anojn inkluzive en la societa jarkotizo. Tiu koncepto ebligis al la asociaj membroj ricevi unue primovadan informilon kun la plej gravaj komunikoj kaj due altnivelan kaj internacie rekonatan revuon kun kultura kaj kleriga karaktero. Ekde ĝia numero 129/1991 la revuo *LF* aperadis dek jarojn kun la aŭspicio de S. Kvankam la SES-membroj komence bonvenigis principe tiun solvon, la jarkunveno de SES en 2001 tamen decidis (post ĉi-rilata enketo), ke la abono al *LF* ne plu estu inkluzivita en la jarkotizo kaj formale nuligis la interkonsenton inter LF-koop kaj S. Samtempe la S.-membroj ekhavis la okazon libervole aboni *LF* aŭ *HdEo* aŭ tute alian Eo-gazeton, laŭ ilia elekto. La kialo de la kontrakt-nuligo estis la altaj kostoj de *LF*. Sed ŝajnas, ke ankaŭ la negativa sinteno de *LF* kontraŭ UEA kaj la propagando favore al la t.n. →Esperanta Civito evidente trovis kreskantan malplaĉon ĉe parto de la S.-membraro.

La kunlaboro kun LF-koop konsekvencis ankaŭ pli da persona influo flanke de →*Giorgio Silfer* (\*1948) kaj →*Perla Martinelli* (\*1938) en S. En 1993 Martinelli, ankaŭ oficanta ĉefredaktoro de *LF*, estis alelektita al la estraro de S. kiel vicprezidantino. Unu jaron poste ŝi avancis al la prezido de S. por tri jaroj, 1995-98 ŝi eĉ rolis kiel ĝenerala sekretario de la Akademio de Eo. En 1997 Ari-Martinelli, kiu kun sia edzo Giorgio Silfer (Valerio Ari) intertempe fariĝis svisaj civitanoj, ne deziris rekandidatiĝi kiel prezidanto, sed tamen resti en la estraro de S.

→Tiam *Bruno Graf* (\*1928), kiu estis prezidanto de S. jam en 1960-63, reaktiviĝis post sia pensiĝo kaj estis elektita kiel nova prezidanto de S., kvankam kontraŭ lia volo. En la sama jaro cetere retiriĝis el la estraro, pro profesiaj kaŭzoj, ankaŭ →Tazio Carlevaro, kiu dum multaj jaroj meritoplene estis je la dispono de S. Kiam dum la ĝenerala kunveno de la jaro 2000 en Lucerno Giorgio Silfer ne estis elektita kiel membro de la S.-estraro, komenciĝis la distanciĝo de la paro Silfer-Martinelli disde S. Dum la malnovaj estraranoj Barbara Pochanke kaj Ernst von May estis danke adiaŭitaj, kiel membroj de la nova estraro estis konfirmitaj →Nicole Margot, Elisabeth Lauper, →Dietrich Weidmann, →Bruno Graf kaj →Perla Martinelli. Per diversaj riproĉoj al la adreso de la estraro de S., kiuj estis publikigitaj en *SES informas* 3/2001 kiel parto de la protokolo, Martinelli laŭte demisiis el la S.-estraro en 2001 kaj, same kiel ŝia edzo, ne plu aperis en la jarkunveno de tiu jaro, sed deklaris ke ŝi restos simpla membro. Bruno Graf replikis la riproĉojn de Martinelli en la sama bultena numero.



SES-prezidanto Bruno Graf en 2003

Kun la necesa racio Bruno Graf kompetente gvidis la asocion, ĉiam klopodante trovi ekvilibron inter la iom obstinaj fortoj kaj dubindaj influoj. Claude Gacond modele redaktis *SES-informas* (ekde n-ro 2/1997) kaj Andreas (Andy) Künzli daŭrigis sian laboron kiel redaktoro de la *Svisa Enciklopedio Planlingva*, kiu fariĝis integra projekto de la jubilea agado 2003. *Angelo Mellini* (1934-2002)

produktis la unuan (kvinlingvan) repaĝon por S.

La membronombro de S. restas stabila aŭ stagnas de jaroj (146 en 1997, 162 en 1999, 155 en 2002, 154 en 2004, 167 en 2005), malpli da personoj partoprenas la jarkunvenon de S. (46 voĉdonrajtaj S.-membroj en 1998, 21 en 2002, 30 en 2003, 29 en 2004 kaj 20 en 2005, 27 en 2006), pluraj lokaj kaj fakaj EG estas minacataj de elĉerpiĝo kaj malapero.

Malgraŭ tiuj nekontentigaj statistikaj konstatoj la 100-jara jubileo de S. solene disvolviĝis la 27an de septembro 2003 en Ouchy-Laŭzano kaj Rolle/VD, kie S. estis fondita antaŭ unu jarcento, kun pli ol cent kontentaj partoprenantoj. La oficiala jubilea programo de S. trovis sian sukcesan daŭrigon en februaro 2004 en Vevey per speciala prelego de Andreas Künzli pri la historio de la planlingva movado en Svislando (kun sesdeko da partoprenantoj) kaj en aprilo 2004 en Les Brenets/NE per speciala aranĝo dediĉita al la neŭŝatela Eo-pioniro →Edouard Ducommun (1865-1951) kadre de la ĝenerala jarkunveno de S. Al la sukcesa realiĝo de tiu jubilea programo esence kontribuis la neelĉerpebla organiza kapacito de Claude Gacond, kiu en 2003 finfine estis elektita kiel honora membro de S.

En aprilo 2004 S. aliĝis al *Eŭropa Esperanto-Ligo* kiel membro-observanto. En 2004 →Nicole Margot partoprenis kiel observanto de S. ĝian 6an Eŭropan Kongreson de EEU en Bilbao (Hispanio). (vd. *SES informas* 2/2004).

En 2006 estis elektita nova estraro de S.: →Mireille Grosjean-Robert kaj →Dietrich Weidmann (kiuj dividas la oficon de la prezidanto en komuna plenumo), Stefano Keller (sekretario), Hans-Werner Grossmann (kasiso), Christiane Sixtus Pot (revizoro). Bruno Graf restas je la dispono kiel estrarano.

**Prezidantoj de Sviza  
Esperanto-Societo (SES):**

1903-04: →Eugène Failletaz (VD)  
 1904: Joseph Feierabend (BE)  
 1904-08: →Friedrich Schneeberger (BE)  
 1908-11: →René de Saussure (GE)  
 1911-13: →Eduard Stettler (BE)  
 1914-15: →Jakob Schmid (BE)  
 1915-17: →René de Saussure (GE)  
 1917-18: →Emma Chenevard (NE)  
 1918-19: P. Schacht  
 1919-21: →Jean Wenger (NE)  
 1921-27: →Edmond Privat (GE)  
 1927-32: →Eduard Stettler (BE)  
 1932-37: Rudolf Gottlieb Maeder (SG)  
 1937-38: Georg Rotach (AR)  
 1938-39: →William Perrenoud (NE)  
 1939-42: →Marcel Jaccard (NE/ZH)  
 1942-45: →Otto Walder (TG/BE)  
 1945-47: →Jules Gilliard (NE)  
 1947-50: →Fritz Liechti (ZH)  
 1950-53: →Werner Laederach (ZH)  
 1953-54: →Hans Herrmann (BE)  
 1954-57: →William Perrenoud (NE)  
 1957-60: →Lilly Schaerer (BE)  
 1960-63: →Bruno Graf (BE)  
 1963-64: provizora kolektiva gvidantaro: Erwin Zuber, Rudolf Schneebeili, →René-William Perrenoud  
 1964-65: →David Buhlmann (VD)  
 1966-71: →Werner Laederach (ZH)  
 1971-72: Karl-Heinz Mischler (ZH)  
 1972-73: →Daniel R. Muhlemann (AG)  
 1973-76: →Otto Walder (TG)  
 1976: →David Buhlmann (VD)  
 1977-79: →Otto Walder (TG)  
 1979-80: István Mórocz (ZH)  
 1980-86: →Arthur Baur (ZH)  
 1986-94: →Claude Gacond (NE)  
 1994-97: →Perla Martinelli  
 1997-2006: →Bruno Graf (BE)  
 2006-: →Mireille Grosjean-Robert (NE) kaj →Dietrich Weidmann/ZH (komuna ofico)

**Jarkunvenoj de SES:**

jaro	loko	kunvenejo
1903	Rolle/VD	hotelo Tête Noire
1904	Coppet/VD	hotelo Du Lac
1905	Luzern	hotelo Rütli
1906	Genève	komerca lernejo
1907	Bern	urba gimnazio
1908	Fribourg	
1909	Lausanne	urbodomo
1910	Aarau	Saalbau
1911	Biel-Bienne	urbodomo
1912	Meggen/LU	Esperanta Paradizo
1913	Bern	hotelo Modern
1914	St. Gallen	Komercista Societo
1915	Bern	hotelo Modern
1916	Neuchâtel	urbodomo
1917	Bern	kafejo Maulbeerbaum
1918	(evidente ne okazis)	
1919	Luzern	hotelo Flora
1920	Bern	hotelo National
1921	Olten (?)	
1922	Zürich	rest. Karl der Grosse
1923	Bern	hotelo Bürgerhaus
1924	Biel-Bienne	hotelo Bielerhof
1925	Biel-Bienne	hotelo Bielerhof
1926	Zürich	rest. Zur Waag
1927	Olten	hotelo Schweizerhof
1928	Bern	
1929	Zürich	rest. Zur Waag
1930	Morges/VD	Kazino
1931	Solothurn	Kantonsratsaal
1932	St. Gallen	Grossratssaal
1933	Neuchâtel	Grossratssaal
1934	Bern	urbodomo
1935	Thun/BE	Progymnasium
1936	Zürich	rest. Zur Waag
1937	Aarau	Grossratssaal
1938	Biel-Bienne	hotelo Seeland
1939	Zürich	rest. Zur Waag
1940	Bern	hotelo Metropol
1941	Langenthal/BE	hotelo Bären
1942	La Neuveville/BE	urbodomo
1943	Locarno/TI	hotelo Métropole
1944	Hertenstein/LU	hotelo Pilatus
1945	Montreux/VD	hotelo Helvétie et des Familles
1946	St. Gallen	rest. Kaufleuten
1947	Luzern	hotelo Rütli
1948	Thun	urbodomo
1949	Häbernbach/BE	

1950	Bern	hotelo Metropol	1997	Bern	hotelo Jardin
1951	Zürich	hotelo Krone	1998	Basel	Eklezia Centro ĉe Riehenring 129
1952	Basel	rest. Rialto			
1953	Bern	hotelo Metropol	1999	Zürich	Akazienhof
1954	Bern	hotelo Metropol	2000	Luzern	hotelo Waldstätterhof
1955	Neuchâtel	stacidoma restoracio	2001	Bern	kongresejo Galaxy
1956	Zürich	hotelo Krone	2002	Luzern	hotelo Steghof
1957	Aarau	rest. Affenkasten	2003	Basel	Eklezia Centro ĉe Riehenring 129
1958	Langenthal	hotelo Bären			
1959	Biel-Bienne	hotelo Volkshaus	2004	Les Brenets/NE	Komunuma aŭlo
1960	Luzern	hotelo Rütli	2005	Zürich	Esperantejo ESZ
1961	Zürich	hotelo Limmathaus	2006	La Chaux-de-Fonds	Urba Biblioteko
1962	Basel	rest. Rialto			
1963	Bern	Komercista Lernejo			
1964	Lausanne	Maison du Peuple			
1965	Solothurn	hotelo Krone			
1966	Zürich	hotelo Glockenhof			
1967	Lausanne	Maison du Peuple			
1968	Aarau	stacidoma restoracio			
1969	Solothurn	hotelo Krone			
1970	Bern	rest. Schmiedstube			
1971	Oltén	hotelo Emmental			
1972	Gwatt/BE	Reformierte Heimstätte			
1973	Gwatt BE	Reformierte Heimstätte			
1974	Zürich	hotelo Rigiblick			
1975	Lausanne	Maison du Peuple			
1976	Bern	rest. Schaer			
1977	Bern	rest. Schaer			
1978	Baden/AG	kantona lernejo			
1979	Bern	rest. Schaer			
1980	Basel	hotelo Rheinfelderhof			
1981	Bern	rest. Schaer			
1982	Luzern	hotelo Monopol & Metropol			
1983	Zürich	stacidoma restoracio			
1984	Zug	urbodomo			
1985	La Chx-Fds	KCE/GEP			
1986	Basel	hotelo Rheinfelderhof			
1987	Bern	hotelo Jardin			
1988	La Chx-Fds	KCE/GEP			
1989	Bern	hotelo Bürgerhaus			
1990	Bern	hotelo Bürgerhaus			
1991	Luzern	hotelo Monopol & Metropol			
1992	Oltén	hotelo Emmental			
1993	Luzern	hotelo Steghof			
1994	Oltén	stacidoma restoracio			
1995	Luzern	hotelo Steghof			
1996	Neuchâtel	stacidoma restoracio			

### **SVISA ESPERANTO-SOCIETO INFORMAS**

Oficiala organo de Svisa Esperanto-Societo (SES) ekde 1991. Ĝis 1996 redaktis ĝin →Fritz Liechti, ekde 1997 redaktas ĝin →Claude Gacond, en kunlaboro kun aliaj.  
→Bibliografio (gazetaro) →SES (gazetaro)

### **SVISA ESPERO**

Oficiala organo de Svisa Esperanta Societo (poste: →Svisa Esperanto-Societo) inter 1903 kaj 1973. Unuaj redaktoroj: Théodore Renard, Edouard Mallet, Edouard Bernard (Genève). Postaj redaktoroj: 1909-10: →René de Saussure, Heinrich Fridöri, Edouard Mallet; 1911-15: Théodore Renard; 1916-18: René de Saussure; 1919: →Karl Jost; 1920: A. Thonney. Dum la 1920aj jaroj *SE* ne aperis (anstataŭe, informoj estis publikigita en *Esperanto* de UEA). Dum la 1930aj jaroj redaktis ĝin sinsekve la EG St. Gallen, la centra komitato de SES, Louise Perrenoud kaj Alice Früh. Dum la 1940aj jaroj la redaktoroj nomiĝis →Marcel Jaccard, →Otto Walder, Walter Fauser kaj →Jules Gilliard. 1951-62: →Arthur Baur; 1962: →Charles Ecabert; 1963-66: →Claude Piron; 1966/67: Otto Walder; 1967-69: Wilhelm Flammer; 1969-73: →Claude Gacond. Ekde 1973 *SE* estis daŭrigita de →Svisa Esperanto-Revuo (SER).  
→Bibliografio (gazetaro) →SES

### **SVISA FERVOJISTO**

Organo de Svisa Asocio de Esperantistaj Fervojistoj (SAEF).  
→Bibliografio (gazetaro) →Fervojistoj

## Kovrilpaĝoj de 'Svisa Espero' kaj 'Svisa Esperanto-Revuo'



Unua numero de *Svisa Espero* en 1903



*Svisa Espero* en 1912, redaktita de Renard kaj eldonita en Fischenthal/ZH (kun *Monda Poŝto*)



*Svisa Espero* en 1914




Kolora kovrilo de *Svisa Espero* en 1909



*Svisa Espero* en 1919



Svisa Espero en 1910 (supre kaj sube)



Svisa Espero en 1937



Svisa Espero en 1958



Titolkapo de Svisa Espero en 1970





Svisa Espero en 1948



Svisa Espero ŝanĝanta sian nomon al Svisa Esperanto-Revuo en 1973



Svisa Espero en 1949



Svisa Espero en 1957



Svisa Esperanto-Revuo en 1980



Titolo de SER en 1986



Titolpaĝo de SES informas en la jaro 2000



En mia arkivo mi trovis ĉi tiun bildon de la esperanto-tago en St. Gallen, la 22-an de majo 1932. Estis mia unua esperanto-travivaĵo. SES tiam havis 706 membrojn kaj en la asembleo en St. Gallen partoprenis cent membroj. En ĉi tiu ĝenerala kunveno la prezidanteco en SES transiris de d-ro F. Stettler, Bern, al d-ro R. Mäder, St. Gallen.

Svisa Esperanto-Revuo en 1984



Titolpaĝo de SES informas en 2004

## SVISLANDO


Svisa enciklopedio sen ĉapitro kun kelkaj klarigoj pri la traktita lando mem verŝajne ne estus kompleta. Tial oni trovas ĉi-loke koncizan tekston ankaŭ pri tiu temo.

Unue kelkaj bazaj ciferoj:

La teritorio de S. mezuras 41'285 km<sup>2</sup>. Fine de 2005 en S. loĝis 7'461'100 personoj, de kiuj 1'541'600 (ĉ. 20%) estas registritaj kiel eksterlandanoj. En 18 de 26 kantoj estas parolata grandparte la germana lingvo (63,7%), 4 kantoj estas francilingvaj, 3 kantoj (BE, FR, VS) estas dulingvaj, do 20,4% de la enloĝantaro koncernas la francilingvan parton. En Tiĉino kaj en la sudaj valoj de Grizono estas parolata la itala lingvo (6,4%). En Grizono oni parolas krom la germana kaj itala ankaŭ la (reto)romanĉan lingvon (tutsvislande 0,5%). 9,0% de la tuto koncernas ceterajn lingvojn. Laŭ la svisa konstitucio la lingva libereco estas garantiata. Inter la eksterlandanoj 20,4% estas italoj, 13,3% devenas el Serbio kaj Montenegro, 10,0% el Portugalio, 9,0% el Germanio, 4,0% el Makedonio, 3,0% el Bosnio kaj Hercegovino, 2,9% el Kroatio, po 5,2% el Turkio kaj Hispanio, 4,5% el Francio, 2,1% el Aŭstrio, 7,3% el aliaj eŭropaj landoj kaj 13,1% el aliaj kontinentoj. Rilate la religion 41,8% estas katolikoj, 35,3% protestantoj, 11,1% konsideras sin senreligiuloj, 4,3% estas islamanoj kaj 1,8% restas ortodoksaj kristanoj.

La koordinatoj de S. estas: No 47°48', Oc 5°57', Su 45°49', Or 10°30'. La nord-suda distanco estas 220 km, la etendiĝo inter okcidento kaj oriento estas 348 km. La plej alta punkto de S. estas 4634 metrojn alta (Dufourspitze/Mone Rosa), la plej granda lago estas la Ĝeneva Lago (Lemana Lago), aliaj lagoj nomiĝas Lago de Konstanco, Kvarkantona Lago, Lagoj de Neuchâtel, Biel-Bienne kaj Murten-Morat; la plej longa rivero estas Rejno (375 km en S.), aliaj pli grandaj riveroj nomiĝas Aare, Reuss, Limmat, Rhône, Tiĉino, Inn. En S. necesas distingi kvin geografiajn zonojn, kiuj havas grandajn diferencojn rilate la klimaton, de nordo al sudo: Ĵuraso, mezlanda ebenaĵo (plataĵo), antaŭ-alpa zono, Alpoj kaj suda flanko de la Alpoj. Nur 38% de la svisa teritorio estas agrikulture utiligeblaj, 30,4%

de la areo konsistas el arbaro kaj 25,5% estas montaraj, fakte neproduktivaj regionoj, 5,8% de la tuta tersurfaco estas kovritaj de konstruaĵoj. La najbaraj landoj de S. nomiĝas: Germanio (norde), Francio (okcidente), Italio (sude), Liĥtenŝtejno kaj Aŭstrio (oriente). Plej grandaj urboj: Zuriko (Zürich, 366'800 enloĝantoj); Ĝenevo (Genève, 185'000); Bazelo (Basel, 166'095); Berno (Bern, 127'200), Laŭzano (Lausanne, 117'160), Lucerno (Luzern, 60'000), Lugano (50'000), La Chaux-de-Fonds, Neuchâtel (po 37'200). (ciferoj de 2005)



Kantoj (supre) kaj lingvaj regionoj (sube)



Plej gravaj datoj el la historio de S.: 1291 unuiĝo de la 'prakantoj' UR, SZ, UW (oficiala fondodato de S.); 1315 kaj 1386 sukcesaj bataloj de Morgarten kaj Sempach kontraŭ la habsburgoj; en 1353 ok kantoj konsistigis Sn.; per la fiasko de la batalo ĉe Marignano en 1515 la teritoria ekspansio de S. finiĝis; 16a jc. reformacio en Zuriko kaj Ĝenevo (la grandaj urboj fariĝis protestantaj, dum precipe centra S. kaj FR, VS, TI, AI restis katolikaj); en la



En sia enkonduko al →*La Fenomeno Svislando* (1979), ĝia aŭtoro →Arthur Baur skribis sub la titolo ‘Unueco en diverseco’ jenajn alineojn:

„Ĉu lando bezonas klarigon aŭ eĉ pravigon? Neniu eldiros tiun demandon, kiam ekzemple oni parolas pri Francujo aŭ la plej multaj aliaj landoj de Eŭropo. La situacio estas alia, kiam temas pri S. Tiu lando estas kvazaŭ kontraŭdiro de la aliaj. Jam en malnovaj tempoj ĝi konfuzis la politikajn observantojn kaj historiografojn. Ili demandis sin, kiel estis eble, ke meze de nia kontinento ekestis nacio, kiu ŝajnas obei al aliaj fundamentaj reguloj ol la aliaj. Mi volas provi klarigi la kaŭzojn kaj samtempe iom profundigi la scion pri S., pri kiu multloke ekzistas nur kelkaj primitivaj scioj, kiujn oni povas resumi per la nomoj Wilhelm Tell, Heinrich Pestalozzi, Henri Dunant aŭ la objektoj ĉokolado, fromaĝo, horloĝoj, bankoj.



Profilo de la montaro kaj riveroj de Svislando

La naskiĝo de S. estis nek memkomprenebla nek facila kaj plurfoje minacis ĝin pere. Granda popolo, kiel ekzemple la germana, povas trairi katastrofojn kaj tamen ĝi povas releviĝi kaj daŭrigi sian ekzistadon, ĉar ĝi estas biologia fakto. Tio ne validas por la svisa popolo, ĉar ĝia ŝtato havas alian radikon, nome politikan volon. Tiu volo certe estas tre forta kaj ne ŝanceligebla, sed ĝi ne estas natura faktoro, nur spirita.

La estiĝo de S. nur estis ebla dank’ al la kombino de du elementoj, kiuj interdependas reciproke: la naturo de la lando kaj la karaktero de ĝia popolo. Sen la montaro ne ekzistis S. La altaj montoj estas sovaĝaj kaj

donacas nenion al sia enloĝantoj, kontraŭe: ili postulas de tiuj daŭran batalon kontraŭ lavangoj, ŝtonfaloj, inundoj kaj streĉan laboron por certigi modestan vivon. Tial ili devigas la montaranojn al atentemo, diligenteo, laboremo, el kio rezultas certa obstineco. Aliflanke la montoj donas protekton. Kiu loĝas en la montaro ne estas facile venkebla. Jam en la unua batalo por la sendependeco apud Morgarten en 1315 la invadinto pagis tiun lecionon per sia sango. En la Dua Mondmilito, kiam S. estis tute ĉirkaŭita, la svisa armeo apogis sin al la Alpoj, kiuj estas efike fortikigitaj; kaj eventuala atakanto sciis, ke la montoj helpas la defendantojn. La montaro ludas grandan rolon en la svisa etoso, eĉ la enloĝantoj de la relative ebena plataĵo sentas sin kiel montaranoj kaj en la karikaturaj desegnoj sin mem kiel alpajn bovistojn. (...)

La popolo, kiu vivas en tiu kadro desegnita de la naturo, tute ne estas unueca, ĝi eĉ ne posedas komunan lingvon, kaj tamen ĝi estas nacio. Tio estas unu el la elementoj de la svisa realeco, kiu estas nur malfacile komprenebla por eksterlandanoj. Forte estas enradikita en la modernaj konceptoj, ke lingvoj kaj nacioj estas identaj. La fakto, ke en nia lando pluraj lingvoj estas parolataj, ne estas unikaĵo. (...) En S. ne ekzistas la nocio de minoritato, kaj lingva leĝaro tute mankas. (...)

La svisa koncepto de nacio estas sendependa de lingvoj, ĝi estas politika, tiel ke nacio kaj ŝtato estas nedisigeblaj. La svisa aŭtoro Denis de Rougemont skribas en sia libro *La Suisse ou l'histoire d'un peuple heureux*: « S. ekestis kiel federacia sistemo, kiu garantias al ĉiu unuopa federaciano ties propran liberecon. Ne la ambicio fondi komunan potencon kaj pligrandigi ĝian teritorion, konservis Sn. ĝis hodiaŭ. Kontraŭe, estas la komuna volo, konservi la lokajn propraĵojn kaj aŭtonomion. » S. estas la produkto de komuna historio kaj la rezulto de komuna volo. Pro tio oni nur povas kompreni Sn., se oni studas ĝian historion. Kion ĉiuj svisoj profunde mallestimas estas la etnismo, ĉar ĝi estas la kontraŭdiro de la ideologia bazo de la svisa nacio. (...)

Oni estus malprava volante aserti, ke la diversecoj de la lingvoj estas bagatelo, sed la lingvaj estas nur unu el multaj diversecoj. Ni ne nur havas kvar lingvojn, sed ankaŭ du konfesiojn, ni havas malriĉajn montarajn regionojn kaj prosperajn industriajn, ni havas grandajn kaj etajn kantonojn, progresemajn kaj konservemajn kaj tiel plu. Ne estas hazardo, ke en la svisa historio okazis ses internaj militoj, sed rimarkinde estas, ke oni ĉiam denove retrovis la internan pacon, ke la komuna centripeta ideo ree kaj ree superis la centrifugajn fortojn.


Estas bonŝanco, ke la multspecaj diferencoj en nia varia lando ne akumuliĝas, sed multloke neŭtraligas sin reciproke. La limoj inter lingvoj kaj konfesioj ne estas identaj, kaj ili same ne koincidas kun la limoj de la kantonoj. Ni havas kantonojn plurlingvajn (Bern, Fribourg, Valezo, Grizono), kaj ne mankas kantonoj, kie ekzistas unuj apud la aliaj regionoj kun katolikaj aŭ reformitaj plimultoj. Oni povas imagi, ke estus pli malfacile certigi la internan harmonion, se ekzemple ĉiuj franclingvanoj estus katolikoj kaj ĉiuj germanlingvanoj reformitaj aŭ inverse. Ĝuste la kruciĝo de la limoj inter niaj diferencoj edukas nin daŭre al komprenemo kaj toleremo, kvankam la homa naturo estas nek komprenema nek tolerema.

La neceseco ĉiam denove trovi solvojn por unuigi malsamajn opiniojn instruis al la svisaj politikistoj konstrui pontojn kaj krei kompromisojn. La 'helveta kompromiso' fariĝis preskaŭ proverba. Ĝi kelkfoje estas kritikata, ĉar ĝi estigas ankaŭ konformismon, sed en tiel komplika lando ĝi estas necesaĵo kaj jam ofte ebligis venki malfacilajn situaciojn. La kompromiso ĝenerale konvenas al la svisa karaktero, ĉar ni ne multe ŝatas batali pri principoj kaj ideologioj havante pragmatan pensmanieron. La sviso preferas solvon, kiu funkcias kiel solvo, kiu aspektas bela laŭ teoria vidpunkto. Tio estas unu el la svisaj sekretoj, sen kiu oni ne povas regi tiel varian landon. La svisa pragmatismo ebligas ne nur, ke la ŝtato funkcias, sed eĉ, ke ĝi funkcias bone. Tion observis eksterlandanoj jam en la dekoka jarcento, kiam S. vivis sub patricia

reĝimo, ili diras la samon hodiaŭ pri la demokrata reĝimo. (...)

Kvankam S. situas en la centro de Eŭropo kak ĉiam sentis la influojn de la najbaroj, ĝia historio ne evoluiĝis paralele kun aliaj landoj, sed preskaŭ regule en kontraŭa direkto. Oni povus diri, ke S. ĉiam estis anakronismo. Kiam en Eŭropo regis la feŭdismo, S. regis sin per demokrata maniero. Kiam en Eŭropo ekzistis preskaŭ nur monarkioj, S. estis respubliko. Kiam en Eŭropo la popoloj dum tridek jaroj militis pro la konfesio, S. ĝuis pacon. Kiam en la aliaj landoj la revolucioj de 1848 fiaskis, S. reformis sin mem kaj kreis modernan ŝtaton. Kiam ekstere la principo 'unu nacio – unu lingvo' kaŭzis militojn, S. efektivigis la kontrŭan principon. Tiu interesa fenomeno estis nomita de la iama rektoro de la Federacia Teknika Altlernejo de Zŭrich (...) 'historia evoluo en kontraŭa senco'. (...)

Sur la pure idea kampo estas pli facile diri, kio distingas Sn. (...) Estas ĉiam danĝere ĝeneraligi kaj deklari iajn trajtojn kiel tipajn de iu popolo, sed se certaj trajtoj frapas ĉiujn eksterlandajn observantojn, oni tamen rajtas nomi ilin tipaj.“



Svislando kaj la alpa regiono